

EMBA

— Ekzilo
kaj azilo —



BELETRAJ KAJEROJ de STAFETO

*** A Distributed Proofreaders Canada eBook ***

This eBook is made available at no cost and with very few restrictions. These restrictions apply only if (1) you make a change in the eBook (other than alteration for different display devices), or (2) you are making commercial use of the eBook. If either of these conditions applies, please check with a <https://www.fadedpage.com> administrator before proceeding. Thousands more FREE eBooks are available at <https://www.fadedpage.com>.

This work is in the Canadian public domain, but may be under copyright in some countries. If you live outside Canada, check your country's copyright laws. **If the book is under copyright in your country, do not download or redistribute this file.**

Title: Ekzilo kaj azilo

Date of first publication: 1962

Author: Imre Baranyai (as Emba) (1902-1961)

Date first posted: Mar. 27, 2020

Date last updated: Mar. 27, 2020

Faded Page eBook #20200359

This eBook was produced by: Andrew Sly

EMBA

Ekzilo kaj Azilo

POEMKOLEKTO

J. RÉGULO ELDONISTO LA LAGUNA

MCMLXII

PROLOGE de Norberto Bartelmes

[Pro kopirajtaj kialoj, la prologo de Bartelmes ne aperas en ĉi tiu teksto.]

*Mi vivis longe en ekzilo
de la mizero kaj doloroj,
poste mi trafis — ne al brilo,
sed, jam rompita, al azilo.
Min premas al la ter' la horoj
sed alten levas rememoroj.*

Ho rememoro, rememoro,

vi estas nur falsita oro.

Sed — kio ver' kaj kio falso?

La tuto estas granda farso.

I. EKZILO

*Mi marŝas al la malproksimoj
de milde verdaj montoj-valoj,
kie ne estas tedaj homoj,
sed min salutas florpetaloj.*

*La voJORandaj ruĝaj floroj,
jen estas miaj kor-amikoj;
la plendon de animo mia
akceptas ame mil kalikoj.*

*Al homoj tute vane sonus
lamentoj de la malespero,
ilin ne tuŝas, eĉ repuŝas
la mornaj markoj de l' mizero.*

*Do jam la homojn mi evitas
kaj vagas en la vastajn forojn,
ke tie mi, la ekzilito,
renkontu ekzilitajn florojn.*

TRAGEDIETO

En loko post la dors' de Dio
en grize drona malproksim'
okazis eta tragedio:
patrino mia naskis min.

Pri l' vilaĝeto diru mi, ke
progresis tie — mizeriĝ'.
La polvo kovris ĉion dike,
vidiĝis sole la malriĉ'.

Ĉe la petrola lampobriilo
balancis min por dorm-allog'
patrino mia en lulilo;
lulilo mia estis trog'.

Kaj ŝi kantetis pri feino
tre favorema al la pet';
ŝi venos sonĝe kun la lino
de donacota ĉemizet'.

Eĉ nun rezumas la naivo
de la dormiga melodi',
kaj akompanos min tra l' vivo,
tra l' granda tragikomedi'.

TIAM

Tiam, antaŭlonge mi luliĝis
en nebulaj revoj de infan’;
tie onde ortritik’ ruliĝis,
buntis papaveto kaj cejan’.

Tre malvastis tiam mia mondo.
Meze staris alte la kastel’.
Ĝia parko, kien gvidis ponto,
estis kaj tabuo kaj mister’.

Sed, mister’ intima, tie zumis
la arbar’ fabelojn al la knab’,
kaj la kampojn timian’ parfumis,
loĝis papilio kaj skarab’.

Mond’ malvasta, sed sen elĉerpeblo:
fola kapro, serioza bov’,
formikujo, frambo inter vepro —
ĉiutage ia nova trov’.

Ĉio ravis min, eĉ la kabano
por mi estis de alloga bel’:
tie min ja vartis panja mano,
kaj enlulis panjo per fabel’.

La dezir’ jam estis plenumiĝo
kaj mi eĉ ne sciis pri l’ esper’,
jes, ĉar al mi estis jam feliĉo
gapi al la stelo de vesper’.

Tiel vivis mi en mondo paca,

nur pri tio miris sen kompren',
kial sur vizaĝ' de l' patro laca
tiom oftas muta malseren'.

MARTELKANTO

Botisto estis mia patro
kaj oftis ĉe ni serenad':
mi kvazaŭ eĉ nun aŭdas noktan
muzikon de la martelad'.

Plurfoje, dum jam ĉiu dormis,
muzikis al mi tra l' malhel'
kiel lulkanto vartistina
la taktaj batoj de martel'.

Lulkantis al mi la martelo
kelkfoje ĝis la kokerik',
min al gajritmaj sorĉaj songoj
enlulis la martel-muzik'.

Sed kiam venis la mateno,
oftege montris amariĝ'
sur la vizaĝo de la patro
pri premaj zorgoj de malriĉ'.

Kaj en la marteltakto tiam
ne estis malpli la rapid',

sed en ĝi tamen sonis surde
la plena perdo de la fid'.

La martelfrapoj bruis, kvazaŭ
ni estus en funebra dom',
kaj tie en la nigran ĉerkon
la najlojn batus nigra hom'.

Jen mia heredaĵ': memoro
pri la duobla patra verk':
pri martelkant' por serenado,
pri martelkanto super ĉerk'.

LA ĜARDENO DE L' PATRINO

Ho tiel, tiel ĝi malgrandis,
kiel knabeta dekpaŝ-longo,
kaj tamen, jen en ĝi girlandis
la floroj de la tuta mondo.

Kaj povis ĝin eniri plene
la ĉielbluo tuta, tuta,
kiam la florojn frumatene
revekis suna kis' saluta.

La papilioj flugis flirte
de la siring' al la verbena,
la vespojn rifuzadis virte

lilioj, logis la jasmeno.

Defiis miozotoj ride
konkuri la ĉiellazuron,
diantoj miris ĝuavide
violon, ties ĉastan puron.

Miraklojn ĉi ĝarden' entenis,
burĝonjuvelojn, tutajn arojn,
sed kiam la patrin' envenis,
mi vidis sole ŝiajn harojn.

KATERINA

En radioj
de la sunsubir',
sur herbeja verd' senfina,
karesate de l' zefir'
sur floroj promenis
la eta Katerina.

Mi neniam
antaŭ tiu tag'
sentis tiklon en la koro,
nek al rava rev-imag'
instigis deloge
min kampa florodoro.

Kaj ne flustris
al mi kamp-floret',
nek la zumo de l' zefiro,
ke ekzistas kor-sekret'
pri fea songbildo,
ekzistas korsopiro.

Nun mi miris,
ke klariĝas vid',
kaj la scio plej fascina
min plenigis per ekscit':
mi treme rimarkis,
ke vivas Katerina.

Kaj post tiu
glora sunsubir'
mi la floro-flustron konis
kaj la senton de l' sopir':
en songoj tronis
reĝine Katerina.

FELIĈO

Ia frenez' min ekposedis:
mi serĉis ĉiam nur la solon
kaj nervis, kaj min ĉio tedis,
mi spitis eĉ patrinan volon.

Kaj premis min la dom' kaj korto;
la kamp', la vasto min altiris.
Tie, sur rivereta bordo,
amase florojn mi deŝiris.

Kaj kronon mi de l' floroj plektis,
poste disŝutis ĝin mallige.
Ia frenezo min infektis
korpreme, tamen feliĉige.

Mi hejmeniris inter revoj,
riproĉe panjo min rigardis
pro malobserv' de miaj devoj,
ke miaj vangoj honte ardis.

Sed mi ne povis pensi saĝe,
kaj kiam la vespero stelis,
mi fartis hejme kiel kaĝe,
de tie ree min elŝtelis.

Mi iris kaŝe inter kanoj,
glitante kiel la fantomo,
ĉe muzik-akompan' de ranoj,
al eta dom', al ŝia domo.

La eta domo brilis blanke:
arĝentis ĝin la luno plena;
mi staris tie, domoflanke,
kaj ŝin imagis surkusena.

Kaj mi postenis ĉe l' fenestro

kiel gardanto de trezoro,
freneze sonis ran-orkestro,
freneze batis mia koro.

Ekkriis koko, ekpurpuris
la horizonto mateniĝa,
kiam mi ŝtele hejmenkuris,
fantom' freneza kaj feliĉa.

MATENA FREŜO

L' oreloj ensorbis birdkanton
en frua matenhoru,
kaj ĉiun laborkomencanton
karezis fojnodoro.

Ensorĉis la pompo matena
eĉ simplan okulparon,
levadis branĉaro sukplena
la pezan foliaron.

Nebulo de sonĝoj aŭroraj
en delikata naĝo
ŝvebadis de l' domoj koloraj
ĉe l' fino de l' vilaĝo.

Al lipoj de homoj zorgplenaj,
perdintaj vivofidon,

la sunaj radioj matenaj
alkisis junan ridon.

En longa aleo mi iris
kun mia amatino,
per sorĉa lazuro nin tiris
magie la senfino.

Kaj venis ankoraŭ aro
da brunaj gejunuloj,
por ŝvite labori sur maro
da fremdaj terobuloj.

Tre certe nin io perfidis
al ili geamantojn,
ĉar ili petole alridis,
kaj eĉ komencis kantojn.

SOMERAJ VOĈOJ

El alteta turo
voĉas tra l' lazuro
sono sonorila
sub la suno brila,
kaj la voĉo el arĝento,
helpe de la mola vento,
flugas pace,
pacdonace,

de l' vilaĝo fora
al la kampo flora:
 gilin-galan'
 galan-gilin'
por kamparan'
 kaj kampulin'.

Trile, trile, trile,
flirte kaj facile
en la brilo hela
de la blu' ĉiela,
kun la sorĉa voĉ' ekzalta
flugas al la alto alta
por vivlaŭdo
 la alaŭdo
de la kampo flora
al la suno glora:
 pean', pean'
 por korinklin'
de kamparan'
 kaj kampulin'.

VI

La horizont' allogas de sur monto,
 vi estas mia horizonto.
Por trink' allogas riveret' sub ponto,
 vi estas mia freŝa fonto.

Arbarsilento, kampoj floraj,
vesperoj fojnodoraj,
la onda oro de tritiko,
printempa birdmuziko,
ridantaj larmoj de Aprilo,
majsuna brilo, ventbabilo,
kaj ĉio, ĉio al mi kara
vi estas, knabinet' kampara,
Katerinet' orhara!

LA LASTA VESPERO

Simile al bestoj ĉasataj en pelo,
la nuboj, gravedaj de fulmoj, puŝate
de vento siblanta, kuregis sen celo,
rifuĝe, tumulte, tordiĝe, pluvbate.

Kaj unu al alia la manojn ni premis
varmege, dolore, pasie, mutbuŝe,
kaj niajn suspirojn la vent' superĝemis,
la nuboj kurantaj frapadis nin duŝe.

De ŝtormo ekstera, de ŝtormo interna
azilon ni serĉis en interkisiĝo,
en buŝinterpremo, brakumo plej ferma.
La vento veadis: disiĝo, disiĝo.

Min pelas, forpelas la lukt' por moneroj.

Reveni, revidi, rekisi — malcerte.
Du orfaj, malsekaj de pluvo paseroj,
tremante de frido, ĉirpetis inerte.

TAGO EL MIA VIVO

Dumnokte: steloj, steloj, steloj,
sopiraj songoj, fe-kasteloj.

Matene: kuro post fortuno;
kun nova suno nova nuno.

Dumtage: ŝvito, vana ago;
kun nova tago nova plago.

Jen ree mortis viv-espero,
mi sidas stulte en vespero.

AŬTUNA SUSPIRO

Sur arboj la folioj flave palas,
kaj unu post alia flirte falas,
folioj flavas kaj faladas lante,
kraketas defalante.

Birdeto orfa sidas silenteme,
ĝin ĉirkaŭflirtas la folioj treme.

Birdet' ne flugas nun, birdet' ne flutas,
funebro ĉie mutas.

Junul' soleca kapokline staras,
lin vento pretersiblas, branĉoj knaras,
la kampoj nudas, lanta pluvo ploras,
soleca kor' doloras.

Sur arboj la folioj flave palas,
kaj unu post alia flirte falas.
Foli-kraket' sur kalvaj terobuloj:
suspir' de malriĉuloj.

VESPERSILENTO

Silentas la vespero,
silentas la pejzaĝ',
kaj brilas super tero
la rida lun-vizaĝ'.

La revoj eksuspiras,
la kor' ekbatas nun.
Tra foraj landoj tiras
la zorgojn jam la sun'.

Ĉi bild' re- kaj revenas

de jaroj mil kaj mil:
la homoj ĉiam emas
revadi ĉe lunbril'.

Revadi pri la bono,
futuro kaj feliĉ'
plej bone scias homo
vivanta en malriĉ'.

NUR UNUFOJE

Mi volus sole unufoje
la ĝustan tempon koni,
kiam komencas dio ĝoje
feliĉon jam disdoni.

Kaj volus mi kun la hastantoj
en ĝusta tempo veni,
kaj foje da donacoj diaj
nur etan sakon preni.

Sed ĉiam mi malfruas, vane
pro kur' min ŝvito lavas,
se dio tiel larĝamane
malŝparan emon havas.

SUB LA SELO

Mi sentas min kaduka ĉevalaĉo
sub selo de la Zorgo-diktator’;
piedoj miaj treme ŝanceliĝas
sub grasa pezo de ĉi grandsinjor’.

La diktatoro dignas sur la dorso,
mi stumblas, stumblas kun pendanta kap’.
Ho, kial li ne batas kapon mian
por plivigliga aŭ mortiga frap’?

Sed li trankvile sidas en la selo,
ne ĝenas lin la stumbla malrapid’,
nur lian egan grasan ventron skuas,
mi sentas, la malica kaŝa rid’.

LA AMATOJ DE LA STELO

Kun ĉiuj mil doloroj de l’ infero
baraktas ni en marĉoj de la tero,
en ties senmezura nigra kot’,
kaj se nin lac’ faligas,
por plua pen’ instigas
aŭ nin en koton premas fera bot’.

Ĉi koton ni eterne knedas, plugas,
kaj sole timaj, kaŝaj pensoj flugas

al la mallum' funebra de l' ciel',
sed scias ni: emergos,
nin amas ja kaj sercos
la stelo, tiu sava stel'.

KRIZO

La frost' la loĝejojn regas,
malsat' la stomakojn segas,
 la stratojn trapasas
 la vento glacie,
 hu-i, hu-i-i!
Kaj homoj amasas,
 superas krie
la uraganon:
 «Laboron, panon!»

Armilojn la Ordo havas,
la rajdpolicanoj glavas.
 L' amaso diskuras
 en vento tempesta,
 hu-i, hu-i-i!
Sed plue murmuras
 vok' cieesta
spitanta canon:
 «Laboron, panon!»

Malantaŭ ŝutraj fenestroj

kaŝiĝas morne la estroj
de l' Kriz' kaj Malsato.
Sed vojon alserĉas,
hu-i, hu-i-i,
la krio de l' strato,
kaj galon verŝas
en la ĉampanon:
«Laboron, panon!»

EN NOKTA HORO

En prema nigra nokta horo
ŝajnas, ke estas mia koro
flamruĝa floro, kies forton
elsuĉas raŭp', kaj kiu morton
sentante estas jam klinota
en malesper' al tero kota.

En prema nigra nokta horo
vekiĝas en ĉi velka koro
sopiro granda, ardpurpura
el aĉa mond' je mondo pura,
en kiu ruĝe pompas justo.
Ho, songĝ' de malespera brusto.

En prema nigra nokta horo
subite ravas min la gloro
de femiraklaj songĝ-inspiroj

indaj je sango de martiroj.
Magia sunobril' aperas,
kaj ree, ree mi esperas.

En prema nigra nokta horo
mortspite ŝvelas mia koro,
dum sankta fajro flamojn svingas,
lumitajn suprojn mi atingas:
atendas mi en vest-ĉifonoj
la Majon de la milionoj!

ĜIS LA VENK'

Se ĝoj' vin trafus iahore,
ne lasu ĝin forflugi plore,
sed ĝin ekkaptu kun impeto,
kaj ĝoju por la ĝoj', proleto!

Se vin karesas man' tenera
simile al zefir' vespera,
malfermu koron kun ampreto,
kaj amu por la am', proleto!

Se Oro ŝtelas vian sangon,
velkigas pala vian vangon,
ĉe via mano estu kreto,
kaj notu por la pag', proleto!

Kaj se la horo per signalo
alarmas voke al batalo,
do, kison al la virineto,
kaj luktu ĝis la venk', proleto!

AL HIRUNDO

Jam forpasis la somero,
prujnon spiros la aŭtun',
en la koroj la esperon
hejtos nur tre pala sun'.

La hirundoj jam forflugas
kaj funebras la pejzaĝ',
pezaj zorgoj al mi plugas
palan kampon de l' vizaĝ'.

Haltu, haltu en aero
kaj aŭskultu min, hirund'!
Jen parolas sur la tero
filo de ĉi griza grund'.

Se printempe vi revenos,
kantu pri la mar-senlim',
vian kanton mi komprenos,
kaj ekflugos la anim'.

Flugos en ĉiel' senbara

post deskuo de katen',
flugos for de l' ter' barbara
al la suno de maten'.

Esperflamoj en mi brulos,
kaj sen limo kaj sen temp'
min per sankta trompo lulos
la mensogo de l' printemp'.

LA KANTO DE LA VIOLO

Mi anoncas reviviĝon
el la frostomorto,
ve, sed per mallonga vivo
dotis min la sorto.

Mi anoncas la printempon,
kun ĝi la sunbrilon
por arbaroj foliaron
kaj la birdotrilon.

Mi anoncas por la buŝoj
dolĉan kison, ridon,
por la koroj renaskitan
amon kaj konfidon.

La animon mi dissendas
per la vento mola,

kaj, dum ĉio ridas, kisas,
mi forvelkas sola,
devas morti sola.

MI AMAS LA VILAĜON

Mi amas la malgrandajn domojn
kun ties neĝe blankaj muroj,
kiujn de supre gardkontrolas
kastela kaj preĝeja turoj.

Mi amas la silenton noktan,
kiam la zorgoj jam ekdormis,
kaj la hundboja songĝ' el nuno
pli belan estontecon formis.

Mi amas labortage ĉiujn
de peno kaloplenajn manojn,
dimanĉe ĉirkaŭ la preĝejo
kraĉantajn krudajn kamparanojn.

Mi amas la ĉifonajn bubojn,
se ili dance formas rondon,
ĉar ankaŭ mi el dom' vilaĝa
ekploris en ĉi putran mondon.

SUR LA GRANDA PAŜTEJO

Herbmilionoj en printempaj ventoj
luliĝas, verdas, kreskas en silento,
kaj marŝas jam al ili pluraj centoj
da bovoj kun nesatigebla ventro.

Pri sukoŝvela trunko, verdo silka
la bonaj herboj fanfaronas vante,
la kardon sekan kun la kapo hirta
ili rigardas moke, malŝatante.

La sukoŝvela trunko, silka verdo
ja gustas bone al la bovogregoj.
La herboj luliĝantaj sen averto
maĉite malaperas en ventregoj.

«Malsaĝaj herboj», diras nun la kardo
restanta sur ruinoj de l' razeno.
«Jen, mi prudente zorgis pri singardo».
Sed venas... kaj ĝin manĝas la azeno.

«Malsaĝa kardo! Kontraŭ la potenco
vin ne defendas iom pika korpo!
Necesas menslaboro kaj scienco!»
Sentencas heleboro kaj eŭforbo.

LA KANTO DE PLUGANTO

Migrobirdo, vi forflugas,
kampe grakas frugileg',
mi la fremdan teron plugas
kun amara klopodeg'.

Migrobird', se vi ekmastros
vian neston post reven',
mi la fremdan teron rastros
kurbe de amara pen'.

Migrobirdo, grajnon, vermon
al la idoj portas vi,
la tritikon, frukton, kernon
ne por mi rikoltas mi.
El la vintro en sunbrilon
de la sudo celas vi,
en la vintra frost' hejtilon
havas mi, se ŝtelas mi.

Migrobirdo, vin sen baro,
sen kateno kaj sen jug'
tra kamparo, tra arbaro
portas la facilaflug'.
Min mizer' al tero ligas,
mi ĝin portas kun humil',
ĉar se ne, min trankviligas
la survango aŭ pafil'.

Migrobirdo, mi volonte
mem forflugus al la urb'.
Laŭ la diroj malpli honte
tie regas la uzurp'.

Tie fratoj solidare
staras en komuna gard',
almilitas jarpostjare
venkojn kun batala hard'.

Migrobirdo, mi nur pense
flugas. Kiel ŝargobest'
mi vegetos paciencie
en ĉi polva-kota nest'.
Ĉu la urbaj fratoj helpos
lukti, venki en la lukt'?
Ho, ĝis tiam min elĉerpos
kruda pen' sen propra frukt'.

SOMERA SEKO

La kampo estas granda sunkameno,
bakiĝas en ĝi verde jam la greno.
Angore staras la ĉifonaj mastroj
kaj por la pluvo preĝas kun la pastroj.

La sun' mokridas pri la preĝ' enua,
ĉion envolvas polvo ĝisgenua,
kaj el la polvo-mar' kun hirta kapo
emergas la Mizer' en stulta gapo.

LA KRUELA SOMERO

Ne ĝojas mi, se venas la somero:
en ĝia arda koro mankas amo,
kaj mian karnon trasekigas
ĝisoste ĝia flamo.

Se la vizaĝo soifegas roson,
ĝi trempas ja en ŝviton mian vangon,
kaj ĝia pluvavida tero
elsuĉas mian sangon.

Kiam la klingo de falĉil' ektintas
rande de ora ocean' da greno,
pen' dentgrinciga por mi ŝanĝas
la benon je malbeno.

Rifuĝi nur la Moŝta Mono povas
al bordoj de la freŝo-spira maro.
Mi trenas ŝarĝon kiel en la
dezert' la dromedaro.

Mi trenas ŝarĝon, besto tolerema,
nur foje, se mi estas mistraktata,
ekbolas en mi por momento
sango de lup' malsata.

Ne timu, la falĉilon rektigitan
ne kaptos mi en tia hor' ekscita
por puŝi ĝin en iun moŝtan:
mi estas ja dresita!

LA KOĈERO

Kvar ĉevaloj kun kaleŝo,
bona ras', facila freŝo,
polvokirle tragalopas,
la okulojn polvo ŝtopas.

Veturigas grandsinjoro,
mond' alia, bril' kaj gloro.
Vojon polvonubo signas,
la koĉero alte dignas.

«Flanken, flanken, he, kampuloj,
aĉaj vermoj de terbuloj!»
Tiajn vortojn li alĵetas,
knabon vipe li pinĉetas.

«Jen do, Joĉjo, tiu inda
kampulido moŝtiĝinta!
Li diable al si plaĉas!»
Diras kamparan' kaj kraĉas.

PEZA RIPOZO

Sur polvaj stratoj antaŭ domoj
gemaljunuloj mute sidis,
silentis polv', silentis homoj,
la tempo en silento glitis.

La nuboj naĝis super ili
kiel flugilaj zorgoj mornaj;
ho, iomete ektrankvili
post la faritaj vojoj dornaj.

Malgrase ili penis, grasis
alia — jen la vivrezulto.
Tiel do viv' ilia pasis;
bone, ke restas jam nemulto.

TOMBO

Lin potenculoj malestimis
kiel la rustan feron,
sub piedpuŝ' li kapon klinis
kaj plugis, semis teron.
Virin' varmsina plezurarde
neniam lin alpremis.
Distriĝi? Drinki? Danci ĉarde?
Li fosis, plugis, semis.

Jen lia tombo... Granda tristo
ne nigras, mankas ploro.
Ĉi tie, en la vintra frosto,
nur larmas mia koro.
Ne sonis ĥor' funebrofeste
nek tombceremonio,
nenia ŝanĝ', nur mortis beste

la vivsemanta dio.

DEMANDO

Ankoraŭ mi memoras, apenaŭ pasis Majo,
kun varme pulsa sango, printempodora gajo,
kiam el ĉiuj floroj juneco stulta ardis,
kaj al la foraj montoj ebrie mi rigardis.

Ne antaŭlonge venis eĉ la somer' sovaĝa,
sed poste ĝia flamo fariĝis aĝa-saĝa,
poste, sur kalvaj vojoj kun grize flavaj flagoj,
enkuris la aŭtunon venene splenaj tagoj.

Kuregas jam la tempo velkbrune tra l' kamparoj,
de ĝia vent' hirtiĝas al mi la grizaj haroj...
Juneco mia, diru, dum rad' sin rule movas,
vetkuri kun la tempo, ho, kial vi ne povas?

ANTAŬ LA SPEGULO

Mi staras mute antaŭ la spegulo.
Vizaĝo fremda min rigardas gape,
kaj kvazaŭ prujno tra aŭtun-nebulo,
jen, grizaj strioj montras sin surkape.

Mi serĉas la malnovajn konatulojn:
riĉbuklan bubon kun la ruĝa vango
kaj kun malhela bluo de l' okuloj,
sur kies lipoj trapurpuris sango.

Mi serĉas la junulon tromemfidan,
kiu en koro kaŝis flaman senton,
printempe ardis amon fulmrapidan
kaj vintre moke ridis la frostventon.

Mi serĉas viron, kiu kante ŝvitis,
tirante jugon sur la vojo dura,
kaj kies firma fido ĉion spitis
en la atendo de la Maj' futura.

Neniu...! Sed jen ulo kun rezignoj
rigardas min kaj palas liaj lipoj,
la sulkoj sur la frunto kiel signoj
restis post batoj de la sortovipoj.

For, for de mi ĉi fremdan vizaĝaĉon,
mi ne akceptas ĝin kun tiaj ecoj...!
Mi volas novan forton kaj kuraĝon!
Spegulo, mi vin rompos je mil pecoj!

KNABETO MORTIS

Laŭtis nia korto

de rido gaj-asperga.
Hop-hop! — sonis vorto
al la ĉevalo verga.

Eta blonda filo
kuretis trote, tinte,
maja brilo-trilo
ridegis ankaŭ vintre.

Sed en tag' de Majo
anĝelo venis, frida,
velkis de li gajo,
frostiĝis buŝo rida.

Vintris ter', ĉielo.
Kaj pri l' dolor' pasia
ridis la anĝelo
kun sia kor' glacia.

ETERNA LULKANTO

Pro perdita ido
ploras turto-par'
kaj la vent', kun frido
ploron de amar'
portas, portas,
 turne tordas
super la kovrilo

de lulilo

miozota

roskovrota...

Dormu, filo, eta filo.

Pro la dolorsvarmo

morda en la kor’

la patrino larmo

inter skua plor’

dense fala

fluas al la

miozot-kovrilo

de lulilo

poreterna,

esper-sterna...

Dormu, filo, blonda filo.

Vundo sen cikatro

sangas en la kor’,

jen mi, via patro

staras jam de hor’

vivolace,

vivmalpace

apud la lulilo

kun kovrilo

miozota

surpluvota...

Dormu, filo, mia filo.

Jam pli bone por vi

en la prasilent’

plu eterne dormi
pace, sen turment',
sen malsato,
 sortobato,
en la tomlulilo,
en trankvilo,
sub la floroj,
 for de ploroj.
Dormu, kara, mia filo.

Dormu, dormu, mia
eta blonda fil',
sonĝu, sonĝu pri la
orfa pilkludil'.
En mistera
 sonĝ' subtera
dormu en trankvilo
sub kovrilo
miozota,
 miozota,
dormu, kara, mia filo.

AL FORIRONTO

Al E. LANTI

Senbrue volas vi de ni foriri,
adiaŭ-flagojn vent' ne ŝiras,

sed ankaŭ l' fruktomaturiga suno
silentas, kiam ĝi foriras
vespere ĉe la horizonto.
Feliĉon, kara forironto!

Vi iros, kiel granda militestro
post venk' foriras el batalo
por serĉi iom da ripozo glora
en verda varmvetera valo,
kie gajritma birdotrilo
lin refreŝigos en trankvilo.

Sed povas esti, ke transocean
batalojn trafos vi denove,
ni bone scias ja, ke via brako
la glavon svingas facilmove,
se temas piki naciismon
aŭ la inside skerman skismon.

Vi estis batalant' unuavica,
ja vi ekbatis la tamburon,
alarmis, levis la standardon,
ekmarŝis, kaj en vian spuron
sub la standardo multaj centoj
ariĝis fide en taĉmentoj.

Vi, laŭ spirito Zamenhofa,
batalis kun la neŭtralistoj,
kun la strabema kaj rabema
nacimistiko de l' filistroj,
kaj kun mensogoj, trompoj, ŝteloj

de manĝegemaj makjaveloj.

Kaj vi rezistis venke, malgraŭ krudo
de la atako malamika,
la sieĝdifektita fortikaĵo
fariĝis nun eĉ pli fortika,
vi povas lasi ĝin al manoj
defendaj de l' fidelaj anoj.

Vi iras, kiel granda militestro
post venk' foriras trankvilkore
kaj ĝoje. Ho, ĉu ĝoje? Tamen, eble
iom amare kaj dolore,
kun malgraŭvenka desaponto.
Feliĉon, kara forironto!

Vi iras for tra akvoj, montoj, valoj,
vi estos mondvagulo sola,
amikoj viaj estos nur la ventoj,
la birdoj, la natur' konsola,
kaj vokos vin la vastaj foroj
per ĉiam novaj florodoroj.

Se en arbaro zuma vi ripozos
apud babila rivereto,
kaj orfa birdo super via kapo
flugos en laca malkvieto,
timante homan persekuton,
akceptu de ĝi mian korsaluton.

PRINTEMPA VELKO

Hej, fieraj, cigarfumaj
palmoj por kafej-ornam'!
Vintre vi dum muzikzumaj
multaj noktoj pompis jam.

Sed alvenis la printempo,
ruĝe krevas florburĝon'.
Por vi estas velkotempo
tiu freŝa florsezon'.

Puras bluo senmakule,
abelzumoj psalmas nun,
kovras polvo vin angule,
kampofloroj ĉarmas nun.

RENKONTIĜO

Ondetis grenkampo grandega, mara
ĉe rand' arbara,
kaj en la ĉielo de klara puro
omaĝis al suno en fru' alaŭda
koloraturo.

Nin varme luladis en sia sino
la kampa muziko. Ĉu vi memoras,
ho amikino?

Inter la parfumo de floroj majaj
ni estis gajaj.

Ni kaptis la nunon sen celoj, planoj,
karexis nin vaga varmeta venteto
per molaj manoj.

Sekretojn fabelis al ni tilioj,
ridante ni kuris en ros' arĝenta
post papilioj.

Ho Maj'! tiu Majo sunbrila, lasta
de ĝojo ĉasta!

La zumoj, parfumoj, majaj koloroj
amĝermojn infane naivajn plantis
en niaj koroj.

Vespere nin benis edena ĉarmo
de kiso unua; de fore trilis
paŝtista ŝalmo.

Ve, mortis ĉi tempo. Jen ni ĉi tie
nun apatie.

Post dekoj da jaroj mi vin revidas,
kaj pro sortobatoj sur vangoj viaj
la laco sidas.

Malĝojo vualas al vi la vidon,
la lukto por vivo sur via buŝo
mortigis la ridon.

Rigardu, nun estas denove Majo,
sed kun malgajo.

Nin ŝarĝas la vivo, kaj bruas urbo,
kaj dronas eĉ niaj memoroj belaj

en griza turpo.
Post dekoj da jaroj! Ĉu vi memoras?
Ni ludis ja kune... Sed ho... Nu, diru,
kial vi ploras?

MIA PATRINO

Tag' post tago ŝi malgajas
kiel vesperiĝ' aŭtuna,
apatie ŝi rigardas
al la malproksim' sensuna.
Iam noktonigre pompis,
nun jam blankas ŝiaj haroj,
kaj la brilon de l' okuloj
rabis for la sepdek jaroj.

Ŝian korpon fortoplenan
rompis penoj de laboro,
kaj pro la suferoj troaj
torporiĝis ŝia koro.
Vanas la konsolaj vortoj,
ŝi esperi plu ne povas,
je l' paroloj esperigaj
eĉ la brovon ne ekmovas.

Se espero kaj obstino
en okuloj miaj ardas,
ŝi nur la horloĝ-montrilon

mute, splene fiksrigardas.
Ho, mi povus tutan mondon
per titana sku' detruui,
por ankoraŭ unufoje
ŝian sunan ridon ĝui.

AL KNABINO PALVIZAĜA

Eklarmas mia koro, vin vidante
en zuma laborejo de uzino,
kiam mil mordajn radojn murmurante
movas la monstra forto de turbino,
kaj viajn vangojn en ĉi raba rito
makulas strioj de fulgmiksa ŝvito.

Mi vin renkontas ankaŭ en kontoro.
Tutage sidas vi ĉe skribmaŝino,
dum viajn formojn taksas direktoro.
Kaj ĝis alvenas rampa tagofino,
en timo, honto, tedo kaj tolero
vi revas pri la amo kaj libero.

Ankaŭ en vendohaloj vi ĉeestas,
vizaĝo via palas post vendtablo.
Dum monon poŝoj de la ĉef' digestas,
vi kun deviga klino kaj afablo
alportas por mi ŝtrumpojn kaj kravatojn
por kiuj mi ŝparadis ses monatojn.

Vin ĉie vidas mi en viv' vandala.
Se por konsolo aĉa en kantinon
min pelas la amar', kun vango pala
vi portas al mi la malbenan vinon,
kaj via rido kompatinde lamas.
Knabino palvizaĝa, mi vin amas.

NIGRA MAJO

Tridekdufoje mi jam vidis
alvenon vian, ho Maj',
kaj ĉiam venis vi kun verdo,
kantbirdo, floro kaj gaj'.
Kaj dum zefiro via flustris,
esper' animon mian nutris,
pli forte batis koro mia
en vent' majmelodia.

Kio la roso por la kampoj,
la suno por la maten',
la fonto por la soifanto,
libero post la katen',
sekreta sonĝo en ekzilo,
espero sub la pendigilo,
vi samo estis en sufero,
ho Majo, maj-espero!

Sed nubo nun ekkovris nigre

radiojn de via sun',
kaj el riĉaĵoj ĉiuj, Majo,
donitaj de via jun',
espero, gajo, kant', aklamado,
perdiĝis la kolor', la flamo,
en floroj ronĝa raŭp' eknestis,
la songo sola estis.

La songo tamen ne perdiĝis,
ne estas fort' kaj potenc',
nek nigra mur', nek paragrafo,
nek leĝo, nek atenc',
kiu la songon povus ligi:
ĝi spitas, vivas por vivi!
Kaj mi en mia kormalgajo
songas pri brila Majo.

AL PLUVEGO

Pluvego frapas, fulmotondras,
impeta vent' min portas puŝe.
Kolera ŝtormo, kial do vi
min lavas, lavas duŝe?

Vestflikojn lavas vi kaj polvon
kaj malpuraĵojn de l' ekstero,
kiuj sur miaj vangoj kovras
la palon de mizero.

Tamen, mi amas la malpuron,
ĉar kaŝas ĝi la homan vundon,
malpuran homon hom' ne zorgas
pli ol la vagan hundon.

Ne duŝu do plu min, pluvego,
se pli da povo vi ne havas,
ja tiun polvon eĉ malforta
knabino de mi lavas.

Vi nur imitas uraganon,
fi, neniaĵo akvokraĉa,
vi vane lavas for la polvon,
se restas la pli aĉa.

For vin, kaj venu kataklismo!
Ĝi faru la teruran draŝon:
forlavu kun la polv' mizeron,
la ĉefan malpuraĵon!

RIFUĜO

Mi tra dezerto fuĝas kure
sub nuboplana firmament',
kaptistoj pelas min surspure
kaj murde venas ŝtorma vent'.

Post mi la inferaĉo bolas,

kaj antaŭ mi la muĝa ŝtorm'.
Mi kuras, kaj ĉi ambaŭ volas
min sterni por eterna dorm'.

Nenie estas rifuĝloko,
arbusto aŭ ŝirmanta tru',
mi jam anhelas ĝis sufoko,
en la oreloj surdas bru'.

Antaŭe, poste kaj jam meze
minacas la eksterma fort',
kiel do savi min sukcese
el ungoj de la nepra mort'?

Mi transformiĝos birdo kanta
kaj flugos al la alta sfer',
de tie kantos, triumfanta,
la kanton de la homliber'.

LETERO AL N. BARTELMES

En posttagmezo griza kaj sensuna
balaas vaga ventfantomo,
kaj antaŭ nia domo
foli-amas' kirliĝas, flava-bruna.
Jes, en la Romanelli-strato
aŭtunas, jam aŭtunas, frato.

Ne antaŭlonge florojn mi kolektis
printempajn florojn de ĝardeno,
kaj nun en malsereno
l' aŭtuno tiajn bukedacojn plektis
el defalintaj foliaroj.
Ho, kuras viv', galopas jaroj.

L' esperojn, kiujn mi dum la junaĝo
en bed' de mia koro flegis,
ve, ŝiris kaj kirlegis
kaj je tiela velka balaaĵo
aglomeradis la vivŝtormoj.
En kor' jam restis sole dornoj.

En tia tago, kiam arboj ĝemas
de tristo vintroantaŭsenta,
la homo malprudenta
suspire la bilancon fari emas
pri la aktivo kaj pasivo
de la somero kaj de l' vivo.

Ni vidu do! Min la Ideo gvidis
al horizonto grandpromesa,
kaj mi en sinforĝesa
entuziasmo klopodante fidis
je la konkordo de l' homaro
per mondproleta solidaro.

Ne mortis tiu fido de l' revulo
sed post la penoj la rezulto
ja estas tre malmulto,

aŭ, se paroli pli sincere, nulo
krom la laciĝo kaj la truoj
oscedaj plande de la ŝuoj.

Jes, al revland' la vojo tro malglatas.

Ne sendanĝera aventuro
la serĉo de l' futuro!

Jen kial mi ne enviinde statas.

Feliĉe, ke l' polic' min servas
kaj kvazaŭ reĝon min observas.

Futuro, ho futuro! Ĝi silentas
obstine, al mi ne respondas.

Sole la vento ondas

fajfante ĉe l' fenestro, kaj mi sentas
la mokan tonon de l' vent-kanto:

«Ho, kompatinda sopiranto!»

Kien do mi sopiras, kompatinda?

Al malproksimoj, malproksimoj
trans la fermantaj limoj,

ĉi kradoj de karcero mia blinda!

Ho — vin ĉe tiu vojirado
renkonti, kara kamarado!

Ne eblas tio! Kvankam kiel bone
ja estus post la manopremo
pri ia tikla temo

ideojn kun vi ŝanĝi plej persone,
libere pensi kaj diskuti,
ne, kiel nun, flankume muti.

Salutojn al vi, kaj sukceson belan
kaj al vi mem kaj al la kara
afero proletara!

Memoru min, ribelan kaj subpelan,
ĉar en la Romanelli-strato
aŭtunas, jam aŭtunas, frato.

FALADAS NEĜO...

Faladas neĝo kaj kovrile
jam kuŝas ĉie sur la tero.
Songadas sub ĝi nun trankvile
la semoj ĝis la primavero.

Faladas neĝ' kaj dike kuŝas
sur la folifalaĵo seka.
Ĉi mortintaĵon vane tuŝas
la sorĉo de l' printempo veka.

Kaj ŝajnas, ke la neĝo tute
jam kovras ankaŭ min, falinton.
La songoj en mi mortis. Mute
mi dormas senprintempan vintron.

REBRILOS LA STELO

Profetoj frenezumas de sia rasorgojlo,
evangelion krias pri rajto de la klabo,
kaj kun ŝaŭmanta buŝo sputadas la Gargojlo,
ke l' mondo apartenas al la Elita Ŝvabo.

En ĉi mallumo, kiam sub boto de vandaloj
baraktas popolrajto, homamo, bono, belo,
inter la sufokataj homaraj idealoj
samsorte estingiĝas la lum' de l' verda stelo.

La «malgermanan» lingvon kondamnis je sufoko
la estro de l' dresistoj de l' rasmenaĝerio,
kaj en la Universo ne estos por ĝi loko
dum la kvardek mil jaroj de l' Tria Imperio.

Kial al sklavpopoloj internacia lingvo?
La granda Valhalestro al ili eĉ forstrekos
ilian propran lingvon per ĉiopova fingro.
Sufiĉos al la sklavoj, se ili beste blekos.

Nu jes, Eŭropo estas grandparte ergastulo,
kie popoloj ĝemas en sklava laborado.
Sed kiel longe? Al la sangmana fantastulo
averton sur la vertron ĵus donis Stalingrado.

Armeon lian tie forglutis la kaptilo
giganta, kaj, kun hurlo furioza, per la ungoj
la bruston al si skrapas ĝissange la Gorilo,
veante pri la nova pere' de Nibelungoj.

Mateno ekkrepuskis! Esperas jam denove

popoloj turmentataj. Eksplodas jubilkrio!
Leviĝos uraganoj kaj forbalaos blove
ĉi tiun malpuraĵon de l' homa historio!

Kaj nia lingvo vivos, kaj sur la Vojo plue
ni povos marŝi rekte, kuraĝe en la celon.
Kaj staros la ekzemplo ateste kaj instrue:
Pereos, kiu volas estingi nian stelon.

Ĉar tiu stelo brilas inter la grandaj lumoj
de l' homaj idealoj kun senmakula puro,
kaj super la obskuroj, arbitroj, frenezumoj
triumfos ĝi, ĉar ame ĝin vartas la Futuro.

II. AZILO

*Printempe kaj aŭtune,
subpluve kaj subsune,
en frosto kaj en ardo,
en fruo kaj en tardo,
feliĉe kaj missorte,
ĝisoste kaj ĝismorte,
mi estas via adoranto,
Liber' kaj Esperanto!*

1945

Ruinoj min ĉirkaŭis fulge, fume,
postgustis mortotima veo,
sed nun mi tamen staris palpebrume
sur kurba supro de l' ŝirmejo.

En la urbmez' ankoraŭ malserene
murmuris la kanonaj kantoj,

sed tie ĉi jam realiĝis plene
la sonĝo de la atendantoj.

Mi ĵetis ĉirkaŭ mi rigardon gvatan,
kvazaŭ mi estus knab' fripona,
kaj min en fruktĝardenon nekonatan
por ŝtelo logus arbo poma.

Lavita ŝtorme, la aero mola
tikleman freŝodoron kaŝis.
Kun kor' batanta kiel bub' petola
la novan mondon mi enpaŝis.

PRINTEMPIĜO

Ĉifonojn de la vintra tolo blanka
traboras brave la floret' galanta,
nubkaravanoj mornaj forveturas,
la firmamento ree blue puras,
zefiro flustra flugas kaj fabelas,
en korojn stultaj revoj sin enŝtelas.

Ni fidu! En ĉi nova primavero
ne venos ventoj trompaj per malvero,
teneraj sole al la floroj klikaj
en la Edeno de la palmoj dikaj,
de kie florojn, kiuj pli humilis,
de longa tempo oni jam ekzilis.

Se leĝo estas tiu diro tinta,
ke renaskiĝos ĉio jam vivinta,
mi ankaŭ mian mortan vivesperon
elmetos sur la sekiĝantan teron,
kun fid', ke en la nova brilserio
ĝin ankaŭ trafos eta sunradio.

DEMOKRATIO VIVU!

Jen, kamparanoj ĉifonvestaj
solene staras sub la arda sun'.
Sur sulkaj vangoj ĝojoj festaj
pro l' granda horo alveninta nun.
Al ili zumas, jen, la muziksonoj
kaj ne al princoj, grafoj kaj baronoj.

Ĝis nun baronoj, grafoj, princoj
uzurpe regis sur ĉi larĝa kamp'.
Kampuloj penu kun dentgrincoj
en ŝvit', malsato kaj humila ramp'!
Jarmilon ili ĝemis en ĉifonoj,
dum pompis princoj, grafoj kaj baronoj.

Nun jen la kampo, dividite!
Finiĝis la miljara termalsat'.
Kiuj ĝin knedis ĝis nun ŝvite,
ricevas ĝin de l' laborula ŝtat'.
Por ili kreskas naturdonoj,

kaj ne por princoj, grafoj kaj baronoj.

Ho brila hor' de tempoj novaj!
En alta bluo kantas la alaŭd'.
Sub ĉiellumoj dancomovaj
tra gajaj kampoj ŝvebas vivolaŭd'.
Demokratio vivu! La blazonoj
rompiĝis, princoj, grafoj kaj baronoj!

EN SONGŔO

En songŕo princinon mi vidis
kun vangoj malsekaj de ploro.
Popolo bienojn dividis,
jen kial ŝin kaptis hororo.

«Feliĉo de plebo kampara,
por mi ĝi ne estas havinda!
Bieno grandega kaj kara,
vi estas aminda, savinda!

Ni ĝin dum mil jaroj posedis
— ŝi plendis dum verŝo de larmoj —,
nun oni ĝin rabis, dispredis,
kaj nin ne defendis ĝendarmoj.

Por kio al plebo ĉifona
la tero, la bienmastiĝo,

ne scias ĝi, kio la bona,
ne scias plezuri el riĉo!

Ĝi scias ja nur laboregi,
brutforte toleri kun flegmo.
Ni sciis plezuri kaj regi,
ni estis ornamoj de l' regno!

Al lando ekstera mi iros
— ŝi diris kun flamaj okuloj —,
de tie la damnojn mi diros
al vi, malamataj kampuloj!»

KAJ FLUGU LA ANIMO...

Mi kiel hom' naskiĝis, kun homrajtoj,
kaj tamen oni igis min servisto,
eĉ besto, ĉar la zorg' en trudaj rajdoj
min pelis sur la dorna voj' de tristo.

Kaj vane mi al dio, al diablo
kaj al Fortuno faris okulumon,
el la ansero de l' riĉula tablo,
Lazar' manĝema, mi nur gajnis plumon.

Mi prenis ĝin, kaj post altranc' kaj fendo
de l' tranĉofino, per la plumo pinta
korsange skribis pri la propra plendo,

kaj pri l' popolo enmizeriĝinta.

Sed nun el la veado de l' sufero,
el la lamento de la homdoloroj
naskiĝu sorĉa kanto de espero
akompanata de fanfarsonoroj!

Kaj flugu la animo kantflugile,
entuziasme pri la justo juĝa!
Printempon triumfantan mi jubile
jam skribos per la sang' de l' koro ruĝa.

MAJKANTO

Maja suno, maja flor',
ridoj eĥas, kantas ĥor',
en plej bela tag' de l' jar'
ĝoje ludas infanar'.

Tago, tago, maja tag'!
Flirtu alte verda flag'!
Mondlingvanoj estas ni,
verdan Majon festas ni.

Kanto, kanto, maja kant',
jam forfloris la lekant',
nun odoras la siring'.
Kantu ni en danca ring'!

Danco, danco, maja danc'!
Al la junaj — amromanc'.
Kisas vento, kisas sun',
knab' knabinon kisas nun.

Majo, Majo, majvesper',
en la koroj nur esper'.
Post la ludoj venu lul'
ĝis fermiĝo de okul'.

Adiaŭas jam la tag',
Klinu sin la verda flag'!
Vento, vento, maja vent',
zumu dormi en silent'!

Nokto, nokto, nokt' en Maj'!
Jam ripozu luda gaj',
kaj ni songu pri feliĉ'
ĝis la ruĝa mateniĝ'!

SUR LARĜAJ KAMPOJ...

Sur larĝaj kampoj
maturas la gren',
ĉielo rozas
en frua maten'.

Plugistoj novaj!

Jen nia moment'!
La propran grenon
karezas la vent'.

Ekkaptu tenilon
de l' akra falçil'!
Rikoltu, rikoltu
en ora sunbril'!

Ne estas per groŝoj
pagata la ŝvit',
ke plenu la poŝoj
de pigra elit'.

Ni plugis kaj semis
de rando ĝis rand',
ni por ni rikoltos,
jam nia la land'!

FABELA POPLO

Poplo staras, jen, gigante,
bluajn altojn atingante
en la mez' de l' kampo.
Suprengape strangan tremon
mi eksentas, knaban emon
por la suprenrampo.

Tiu aĝ' kaj forto foras,
sed, revante, mi memoras
pri l' fabel-rakonto:
«Sola, en majesta noblo,
staras ĉielbora poplo
en la mez' de l' mondo.

Se vi volas temerari,
en la fia mondo fari
fine grandan ordon,
grimpu ĝin! Se vi atingos
ĝian pinton, ĝi vin svingos
trans la ĉielpordon.

Helpos vin ĉielarmeoj,
ĉesos dank' al vi la veoj,
ĝemoj, larmoruloj.
Super mondo ridsonora
estos vi la ĉielglora
Reĝo de l' Futuroj!»

MARGARETA

Ŝi amis la amon,
la dolĉajn momentojn,
kaj, koro ĉe koro,
gustumon de sentoj.

Ŝi amis duopon
en horo vespera,
surkorpe la ludon
de mano tenera.

Ŝi amis brakumi
kun arda suspiro,
ŝi amis la kison
sen fin' kaj sen spiro.

Ŝi amis la Vivon,
la Ĉion, la Tuton,
premitan perforte
en unu minuton.

DIMANĈA MATENO

La etajn domojn lante
silento lulis,
en florigarden' bluante
miozotoj okulis.

La vilaĝeton oraj
lumfaskoj ornamis,
la sunradioj gloraj
brilegis kaj flamis.

La brilaj buntoj mutis

en granda silento,
nur la minutoj flutis
en tempo-torento.

VIVSONORO

Abeloj flugas kun ŝarĝriĉo,
pilkludas knab' en gaja salt',
la vivo vivas per moviĝo,
lacigas sole la halt'.

Mi iras el la valo verda
al supro de la roka mont',
mi vagas, vole vojoporda,
kaprica mondvagabond'.

Postrestas post mi ĉio brua,
kaj nun ne flustras eĉ la vent',
preskaŭ doloras ege blua
brileg' de la firmament'.

De l' raraj herboj gapas muto,
senviva ŝajnas jam la ter'...
Ha, sonas, kvazaŭ por saluto,
sonora pioĉa fer'!

KONSILOJ

Se vi ne scias kion fari,
ĉar via kor' en duboj dronas,
direktu vin al la Naturo,
ĝi tuj konsilon al vi donas.

Demandu foje la tempeston,
kiam sortbatoj vin martelos.
Ĝi diros: La venteg' purigas,
kaj post malhelo ĉiam helos.

Demandu foje la abelon,
se vi anhelas de laciĝo,
ĉu indas peni. Ĝi respondos:
Riĉ' abeluja — mia riĉo.

Demandu foje la ĉielon,
se la humoron kovras ŝimo.
Ĝi diros: Jen la horizonto,
ĝi vin invitas al senlimo.

Demandu foje la birdetojn,
kiam la dub' en vi aperos,
ĉu eblas fidi je la amo.
La turtoj al vi jese kveros.

Demandu foje floran kampon,
se l' vivenuo vin invadas,
ĉu indas vivi nian vivon.
La kampaj floroj kapjesadas.

MIA FILINETO

Orblonde ondas ŝiaj haroj
simile al la spiko-maroj,
kiam la ventomelodioj
ludadas kun la sunradioj.

Kaj bluas paro de l' okuloj
simile al ĉiellazuroj
super lageto tre trankvila
en frumateno freŝe brila.

Muzikas ŝia rido trila
kiel arĝento sonorila
sur kol' de ŝafineto gaja
en ia fea kampo maja.

Ŝi flirtas kun facila freŝo,
kiel feino en kaleŝo
tirata fluge de libelo
en infansonĝo aŭ fabelo.

Orinja estas ŝia nomo,
ekfloris ŝi en mia domo,
el mia koro ŝi elfloris
kaj ŝi la vivon al mi oris.

Ŝi estas ĝojo nedirebla,
konsolo en la temp' funebra,
kien ŝi paŝas en trakuro,
postrestas or' en ŝia spuro.

El or' ja estas ŝia koro,
ŝi estas mia ortrezoro,
feliĉo, riĉo, lukso, pompo,
kaj mia amo ĝis la tombo.

EN MIA NASKVILAĜO

Sur polva strato, inter knaba moko,
anasoj marŝis vigle al naĝloko,
dum pacaj bovoj lante, en silento
tiris la veturilon de la tempo.

Jen estis la kastel' kaj la kabano,
kie mi vivis vivon de infano.
En la sunbrilo, ĉe l' arbara rando
filandroj flosis for al fea lando.

Nenio, ŝajne, estis ŝanĝiĝinta,
nur grizis pli la preĝejturo pinta,
kaj mi nenie trovis tiun pinon,
ĉe kiu mi atendis l' amatinon.

VANA, VANA

Memoro pri knabino kamparana

en mia koro eĉ nun alte arkas,
kaj ŝia orblondeco vive sana
en la anima fundo sparkas, sparkas.

Mi scias, ke pasinta printemphoro
neniam plu revenas sama, sama,
kaj la serĉado de velkinta floro
inter la novaj estas vana, vana.

AL LA MEMORO

Memoro truda, kial vi min tentas,
kiam la kordoloroj jam silentas
simile al la laciĝintaj ventoj
kaj dormas en arbaro de la tempoj?

Memoro tenta, kial vi vin trudas,
nun, kiam miaj vundoj jam ne nudas?
Ho lasu ilin subcikatre dormi,
ne volu ilin ŝiri, novajn dorni.

Memoro, vi ne estas ja Promeso,
ripozu do en lito de forgeso
simile al tombkruco jam kuŝanta
sur tombo forlasita, senpriplanta.

EN SOLECA HORO

En soleca horo
pensoj boras min,
en soleca horo
mi memoras vin.

Vi min zorgis, vartis
kun ĉiama pret',
kaj mi vin rigardis
dua patrinet'.

De vizaĝo via
sunis korsincer',
vivvojaĝo via
estis sinofer'.

Ploras la betuloj
en tombeja fin'
super la terbuloj,
karulin', fratin'.

MI

Denaske iĝis mi hungaro
(pri vol' neniuj min demandis).
Oni min lulis sur kamparo
(la av' ĝin nudpiede plandis).

Sub oraj spikoj de tritiko
min nutris sole pano seka,
al songôj estis la liriko
la trista voĉ' de bovo bleka.

Mi de fremdnoma grafo lernis
la patriaman vortoĵonglon.
(Parenĉ' de tiu graf' ekstermis
el patriamo mian onklon).

Preĝeje la predik-fabelo
vanecon de la riĉ' instruis,
sed firme pompis la kastelo
kaj la instruon belan truis.

Denaske iĝis mi hungaro,
sed same povus esti polo.
La tutamonda proletaro —
jen mia lando, mia skolo!

Mi volas esti homo nura,
libera de la rudimentoj,
en kiu brulas flame pura
fratamo al la homaj gentoj.

LA PENSO

Facile flugu pura penso

tra ĉiu lando, ĉiu lim’.
Ĝi portu markon de la menso,
aspiron ardan de l’ anim’.

La penso estu plej libera,
kiel la birdo en aer’,
kiun ne baras reto fera,
nek feraj leĝoj de la ter’.

La penso estu june pura
kiel la ĵus falinta neg’.
Makulu ĝin nenia dura
deziro aŭ mensoga preĝ’.

La penso juna, penso justa,
la pens’ libera, klara kler’
triumfu super ŝlosa rusta
de ĉia dogmo kaj ĥimer’.

La penso estas pleja dono
de la natur’ al homa est’,
kaj ĝin kateni per ordono
la homon igas bava best’.

Ne, ne, ne eblas la afero:
la penson fermi per barad’.
Ĝi pli facile ol etero
forflugas tra l’ karcera krad’.

Kaj se despoto ĝin enfokus
en meza mezo de l’ terglob’,

ĝi streĉus sin, la streĉ' kolosus,
la globon rompus per eksplod'!

ALLOGIĜO

Kiam mi vin ekvidas,
printempo estas refoje,
apenaŭ mi min bridas,
burgonoj krevas ĉe-voje.

Kiam mi vin ekvidas,
la turpa tempo rekuras:
paseo mia ridas,
nuntempas kaj futuras.

Sed ve, en mia brusto
la volo pasia vanas:
starante en embusko
la aĝo min alrikanas.

FROSTFLORO

Sur vitro fenestre
glacias frostfloro,
en brusto maldekstre

glacias la koro.

Glacias okule
la fonto de larmo.
Ho vartu min lule,
virin', via ĉarmo!

Pleniĝos per varmo
de vivo la koro,
ekfluos la larmo
ĉe skuoj de ploro.

MI VIN DEZIRAS...

Mi vin deziras kiel la flugon la hirundo,
mi vin deziras kiel la freŝan vindon vundo.

Mi vin deziras kiel la signallumon ŝipo
erarvaganta nokte kun frakasita ripo.

Mi vin deziras kiel la buŝ' deziras ridon,
mi vin deziras kiel blindul' deziras vidon.

Mi vin deziras kiel la pluvon seka tero,
mi vin deziras kiel esperon malespero.

Mi vin deziras tiel, ke tio eliksire
vivigas min, kaj tiel, ke mortas mi sopire.

KONI VIN...

Cel' de sopiroj, fonto de plezura
frenezo, sorĉa vaz' de kulpoj sanktaj,
kusen' el felanugoj karesantaj
kaj el karnŝira dorn-amaso dura!

Ĉielbeata kaj infertortura
estas la sento, kiun vi inspiras,
la koron vi kuracas kaj disŝiras,
satan-lasciva kaj anĝele pura!

Tian idolon faris mi perplekse
el vi, kaj nun vi min obsedas sekse.
Ho koni vin, Edeno kaj Geheno!

Ho koni vin, ke post volupt' infera
por kelka temp' mi sentu min libera
de ĉi obsed' per sava abomeno!

PALINODIO

Sopirojn mildajn kaj dezirojn ardajn
plenumis vi beate, beatige.
De tiam mi iradas lunatike,
de l' koro sentas kreski florojn tardajn.

Mi pekis versojn durajn kaj ponardajn,

nun pardonpete mi pri tiuj hontas,
kaj el okuloj miaj larmoj fontas
ĉe l' vido de l' okuloj mildrigardaj.

Anĝel' vi estas, jes, anĝelo nura,
kaj vin nur mia fantazi' malpura
akuzis per diabla animrabo.

Ĉiel' plenigas min, ne abomeno!
Koncipu de l' volupt' en la ingveno,
kaj nasku, kara, min renasku knabo!

TURDO

Tro frua turdo freŝe flutas
la mateniĝan kanton.
Mi mutas, mutas, ne salutas
resone la kantanton.

Sed kanto estas kiel sango,
kaj ruĝas sang' ekscite.
Mi volus, eĉ kun pala vango
ekkanti tamen, spite!

Oj, false nun la turdo tonis,
kaj tio min tre ĝenas.
La trilo, kiu mise sonis,
de l' kanto min detenas.

PRIMAVERO

Jen trilas trilo trile trila,
jen brilas brilo brile brila,
ĉi-ĉi-ĉi, verdas vasta valo
ĉi-ĉi-ĉi, kantas najtingalo.

En la brilo, en la trilo
floras floro, grincas grilo.
Ĉi-ĉi-ĉi, tra la tuta tero
muzikas, dancas primavero.

En granda trila-brila vervo
luliĝas ĉiu cerb' kaj nervo.
Proleto, en ĉi trilo valsa
atentu pri la tono falsa.

Eble falkoj fajfos fale
melodion najtingale.
Proleto, gajtemperamente
ekdancu, sed ne senatente!

La karajn kantojn kantu kore,
laboru bone, bonhumore,
la Ordo, fidu, regas rekte,
sed ne luliĝu sensuspekte.

Floroj floru, birdoj trilu,
en orkestro vi nur grilu.
En granda festa glordiboĉo
plej glora ĉi modesta voĉo.

AKVINKUM

Mi sidas sub tilio, mi, la vivanta homo.
Ruinoj de Akvinkum kuŝadas ĉirkaŭ mi,
kaj el la muroruboj la fantomanta Romo
susuras pri forpaso de monda imperi'.

Kvazaŭ l' antikvaj dioj suspirus tristrigarde
pri l' forto de l' legioj kaj glori de l' Roma gent',
pri belulinoj, kiuj amis kaj kisis arde
inter ĉi tiuj ŝtonoj polviĝaj en silent'.

Antaŭŝovita pugno de *Urbs*, la mond-priraba,
en kiu kreis riĉon miraklan la sklavar',
estis ĉi soldaturbo, dum en flankumo straba
forrabi la rabaĵon avidis la barbar'.

Riĉon amasigitan per rab' kaj sklavlaboro
defendis la legioj kontraŭ la rab-atak',
dum la sklav-ribelemon sufokis la memoro
pri l' krucoj, kie pendis glavuloj de Spartak'.

Ĉi tie, ĉe Danubo, ĉe la maljuna Ister,
kie la vintroj duras, sed plaŭdas varma font',
la sklavoj metis murojn, kaj staris longreziste
urbet' fortikigita ĉe l' fino de la mond'.

Ekstere spitis muroj al la atak' surpriza,
sunbrilo ludis sur la ŝildoj de l' gard-kohort'.
Interne estis kvazaŭ Rometo improviza:
palestro, cirk', banejoj kaj ĉio por komfort'.

Jes ja, ne mankis distro, plezuro kaj festeno
en ĉi ekstrema punkto, ĉe l' imperia lim'.
Kiaj spektakloj bruas sur tiu ĉi areno?
Kiajn orgiojn vidis ĉi mozaik-pavim'?

Kaj kio jam fariĝis ĉio ĉi? Ruinaĵo.
Lacertoj en sunbrilo baniĝas sur la rub',
kaj en aven' sovaĝa vadas la homa paŝo,
kun kap' de ia dio pilkludas gaja bub'.

Ho vi, Eterna Paso! Jen, kiom da fiero,
potenco kaj kreaĵoj de laborula ŝvit'
vi jam malaperigis glute en la rivero
ondanta al malluma maro de l' infinit'!

Kun la jarmiloj dronaj tre multaj brilaj steloj
de potenculoj falis el alto de ĉiel',
sed vivas nun ankoraŭ subpremoj kaj krueloj,
lupoj en propra felo, lupoj en ŝafa fel'.

La sava morto sendas ripozi sklavajn brakojn,
puŝantojn de fosilo, svingantojn de martel'.
Eterne vivas nur la malamo de l' Spartakoj,
de temp' al temp' eruptas kiel Vezuv-krater'.

FALO

Ho, tiel bele estis fidi, fidi!

Min lulis balancilo de l' espero
kaj svingis. Kaj mi ne povis bridu,
jam ŝajnis, ke mi flugos for de l' tero.

Okazis io. Ĉu ŝiriĝo ŝnura?
Subite mi defalis pug-al-ŝtone.
Mi flugi volis tra l' aer' lazura;
nun, se mi povus rampi, estus bone.

ENIGMO

Sed kial do silentas
la esperantaj bekoj?
Ĉu ili mute pentas
pri iaj grandaj pekoj?

El kia stranga kaŭzo,
kun kia stranga celo
do estas tia paŭzo
en bril' de l' verda stelo?

De kie nian lingvon
do trafis tia puŝo,
ke tenas ni la fingron
mistere sur la buŝo?

Mi vane min turmentas
por solvi ĉi enigmon,

sed mi ribele sentas
aflikton kaj indignon.

Ribele mi parolas
poetaŭgur-misteron:
Pereos, kiu volas
estingi nian stelon.

LASU...

Lasu en trankvilo paca
ruliĝadi la riverojn
kaj sen spit' en spleno laca
dissplitiĝi la esperojn.

Lasu tiujn en trankvilo
iri for de l' verda kampo
kaj sin turni en humilo
al la leviĝinta lampo.

Lasu tiujn en trankvilo
estingadi nian stelon;
en fortega lampobriilo
ĉu bezoni ties helon?

Lasu tiujn plu incensi
tiun homon sacerdote.
Ja ne ĉiu povas pensi

pli humane ol bigote.

LA NEAKIREBLAĴO

Mi plugis virgan grundon ĉe vilaĝo
kaj semis grenajn grajnojn dum junaĝo,
sur fremda kampo kurbajn garbojn ligis,
de fru' ĝis nokto min labor' ŝvitigis,
nokte forpelis mi la songfeinon
kaj tamen ne akiris skribmaŝinon.

Mi lernis skribi, libroteni false,
laŭ la ordon' de l' ĉefo danci valse,
honeste trompi kiel komercisto,
vendadi kiĉajn bildojn de la Kristo
kaj miksi akvon en la bonan vinon,
sed tamen ne akiris skribmaŝinon.

Mi flegis florojn en fremdula korto,
ne timis de surdorsa sterkoporto,
mi estis vice laboristo taga,
komizo, oficisto, landovaga
agent' uzanta la persvad-rutininon,
sed tamen ne akiris skribmaŝinon.

Salajris mi en multaj laborformoj,
libere, fikse kaj sub prem' de normoj,
mi servis kapitalon, komunumon,

sed, sopirante la sufiĉan sumon,
mi trafis ĉiam nur ĉi frostan finon:
mi tamen ne akiris skribmaŝinon.

Mi verkis versojn, gazetartikolojn,
mi lernis dogmojn kaj aniĝis skolojn,
mi legis prozon mute, versojn kante,
movadis, esperantis esperante,
pro la movad' eĉ perdis amatinon,
kaj tamen ne akiris skribmaŝinon.

VESPERAJ PAPILIOJ

Freneza strebo,
diboĉo ĝoja,
ebria ŝvebo
kaj danc' re- kaj refoja!
Jen nia sorĉomondo;
ĝin donas brilo lampa.
Ni flirtu en la lumorondo
kaj rampu vermo rampa.

La brilo ora,
la danc' ebria
en vest' kolora,
Jen estas mondo nia!
Kaj ekster la lumrondo
ne gravas nokt' malluma,

ni flirtu en la sorĉomondo
en danco gaje zuma.

Malbone gustas
mensogo tia,
se iu flustras
pri nigra mond' alia.
Nur bril' ekzistas nuna,
la ombro mankas plene!
Ni flirtu en la rondo luma,
la vermo rampu pene!

Ni buntas veste
en lampobrilo,
kaj sparkas feste
orpolvo sur flugilo.
Alia mond' ne gravas,
eĉ se ĝi estas ie...
Nur nia sorĉa rondo pravas,
ni flirtu ĝojpasie!

HIRUNDO MORTPAFITA

Ĉasist' murdema pafis la hirundon
flugantan gaje kun printempa fid',
kaj flugilfrakasite sur la grundon
ĝi falis, kuŝis jam en mortrigid',
kiam poeto venis tenerkora,

ĝin levis, portis al herbejo flora.

En bunta freŝo de herbej' floroza,
ombre de granda kverko estas tomb',
kaj tie, en kvieto dolĉripoza
la birdo kuŝas post la vivo-romp'.
La bird', la povra birdo pace kuŝas,
hororo hirta de nun ĝin ne tuŝas.

Abeloj tiun tombon ĉirkaŭzumas
ĉe fora muĝ' de granda riverreg',
ĝin malvo, mento, timian' parfumas,
kaj nokte de lampiroj tuta greg'
ĝin iluminas vete kun la astroj
plorantaj brilon tra l' ĉielaj vastoj.

Kaŝita loko, kiel pura penso
profunde sekretata en la kor'
kaj aflustrata nur en konfidenco
de plej sincera kaj intima hor',
kaŝita loko de funebra kulto,
for de la mondkonfuz' kaj vivtumulto.

Trankvila loko, kiel feĝardeno,
kian ni vidas nur en songobild'!
Feinoj tie ŝvebas kun gardemo
pri la eterna songo de la bird'.
Neniu hom' pri tiu tombo scias,
ĝin sole mia koro fantazias.

Jes, tiu tomb' sekreta kaj simbola

nur estas revo de poeta kor',
kaj estas tiu tomb' ne unu sola:
pafita estis tuta birda ĥor'.
Ĉasist' murdemis tra l' arbar' terure,
senbirdaj branĉoj bruas ĝemmurmure.

Ho, vanaj veoj de dolor' senpova!
Nur larmi, larmi, kion fari pli?
Malnova kantistaro de la Nova
Epoko, kien malaperis vi?
Per kies man', el kia kaŭz' enigma
okazis ĉi pereco senpostsigna?

La tombo fantazia kaj simbola,
la revo de la funebranta kor',
brilu en milda lumo aŭreola
de kora, kamarada rememor'!
Kaj en la sang' martira kresku floro
de la futur' kaj por viktimoj gloro!

SPLITOJ

1

Deviz' belega la frateco,
sed ofte nur malplena frazo,
ne pli fruktanta ol florspeco
farita el papera peco,

staranta en senfunda vazoj.

2

Tra l' kosmo min flugigas la raketo,
la fora sun' jam estas nur steleto,
kun rapideco de lumo mi rapidas,
post mia dors' la nigra zorgo sidas.

3

Eterna movo, turnigado, paso,
eĉ halt' momenta estus mondfrakaso.
Jes ja, ne eblas halti por momento,
kiel malfirma, ve, la firmamento.

4

La bird' en kaĝo forta,
eĉ granda kaj komforta,
eĉ el arĝento vera,
ne estas bird' libera.

5

Post tromultiĝo de l' homraso
ĉu sekvos reciproka ĉaso
per atombombo kaj per gaso,
ĝis fine sur la teroj vastaj
vegetos kelkaj homoj lastaj
sterilaj de l' radioj kastraj?

6

De l' Tero, kiel ajn la Fato nigros,
 la homo ne elmigros.
 Ĉi hompatri' estas por raso homa
 lulilo bona, tombo bona.

7

Filozofi'! Respektu ĉi sciencon,
 kiu elspuras ĉies kvintesencon.
 De ĉio ĝi klarigas la sekreton
 per tio, ke surgluas ĝi vinjeton.

8

Eterna paco? Revo stulta!
 La vivo estas murdo multa.
 Nun floro kaj herbeto
 kaj arbo kaj arbeto
 el saloj kaj aero vivas,
 alies vivon ne soifas.

9

Ej, ne aŭskultu pri la vana
 grumblado de poet' malsana,
 sed vivu vivon, faru devon
 kaj amu amon, revu revon!

LA ARBO DE JUNECO

Sur verda arbo de juneco
la floroj estis sange ruĝaj,
kun forto de plej spita speco
ĝi staris en la ventoj muĝaj.

Se fleksis ĝin la uragano
kurbige ĝis la tero kota,
elaste de la juna sano
ĝi restariĝis, nevenkota.

Ho, arbo de junec' iama!
En pleno de printempa pompo
ĝi staras seka, senornama,
atende je venteta rompo.

ROZ' AŬTUNA*

Kiam vivkoloroj jam ekpalas
kaj fenestrojn niajn larm' vualas,
floras vi de l' lasta varmo suna,
roz' aŭtuna, blanka roz' aŭtuna.

Jam lamentas veaj ventohoroj
pri tretitaj kampoj, velkaj floroj,
sed vi pompas, freŝa kaj imuna,
roz' aŭtuna, blanka roz' aŭtuna.

Palos vi sur tombo ĉe l' urbfino
kiel la malsana teksistino,
vin ĉirkaŭos velko flava-bruna,
roz' aŭtuna, blanka roz' aŭtuna.

Sed, ankoraŭ juna kaj serena,
brilas vi en via belo plena,
kaj ridetas, ĉarmas kaj allogas,
la printempon al mi remensogas.

«Roz' aŭtuna, se mi vin rigardas,
pro l' sopiro mia kor' ekardas:
por moment' revenu aĝo juna!
Roz' aŭtuna, blanka roz' aŭtuna».

* *Rozo aŭtuna* = *astero*. La lasta strofo estas citaĵo el hungara kantoteksto.

LA STRATO

Lokomotivon venkas la dizelo,
dizelon la turbino, la turbinon
devancas la raketo. La akcelo
de l' vivo ĝis frenez' ne havas finon.

Sirene frenezumas la fabrikoj,
la fumtubegoj signas per fumsvingo:
Necesas pli da ŝtalo, pli da brikoj!

Ni urĝas! Hastu! Por futur-atingo!

Meditas en matena fru' la strato:
Kiel la homoj hastas kaj sin urĝas
atingi la futuron! Sed — jen fato —
ilin nur ĉiam la nuntempo skurĝas.

NOVJARA PENSO

Ĉiam promese venas
la novaj, novaj jaroj,
kaj unu post alia
ĉifiĝas kalendaroj.

Promeso januara
decembre jam fiktivo.
Ĉifiĝas kalendaroj,
ĉifiĝas nia vivo.

Nur du aziloj estas
por stulta homa koro:
memoro kaj espero,
espero kaj memoro.

Rigardas la junulo
antaŭen fide-fida,
la pas' de l' tempo estas
por li tre malrapida.

Sed kiu sin de tomba
proksimo devas gardi,
jam pli deziras al la
paseo rerigardi.

Tre duba la futuro,
tre trista la paseo:
por mia samsortulo
nur restas kelka veo.

VINON

Turmentas ege min io
premega en la kranio!
Ho donu vinojn, vinojn multajn,
surverŝi miajn pensojn stultajn!

Tra kiu ĉi idoj mensaj
eskapus en vortoj densaj,
la gorgê' ne voĉu plu, sed mute
nur vinon glutu avidglute.

Ne pensi kaj plu ne voĉi,
nur drinki, drinke diboĉi,
kaj fine kiel porko kote,
kuŝi feliĉe, vin-narkote!

STULTO

Jam sunaj tagoj devus esti
kaj valoj sin per verdo vesti,
sed tamen fridas vento puŝe
kaj magra merlo fajfas fuŝe.

Burĝonoj timas de malfermo,
retenas nazon ĉiu ĝermo,
palpante la printemp' malfruas,
veter' kaj tempo ne kongruas.

La vintro provas sin transsavi,
kaj de l' printemp' semajnojn havi.
L' aŭtuno eble same strabos,
kaj somertagojn ĝi forrabos.

Stultiĝis la klimato multe,
sed mi kondutas eĉ pli stulte:
kun griza verto junpretende
frenezas mi printemp-atende.

* * *

Fornaĝis fine la neĝnuboj lastaj,
jam turtoj flegas sian neston,
pudore bluas la violoj ĉastaj,
la arboj prenas verdan veston.

Printempe vestas sin eĉ la knabinoj
kaj montras siajn formojn brave,

kun kaŝa amsopiro en la sinoj
promenas tra la parko pave.

Ha, nuptojn kovras la ĉiela kloŝo!
Gravede grincas gaja grilo.
Kaj eĉ en olda pantalona poŝo
nun malfermiĝas la tranĉilo.

AMA POEMO

Amata Lona, venu, vin mi kantos,
al via kapo florornamon bantos.
El varmaj vortoj el la fundo kora
formiĝu la girlando multkolora
kaj brilu en la blondo de l' hararo
festone kiel rozoj sur altaro.

Krom mia amo, min por tio movas
la onidiro, ke mi vidi povas
nur dornojn, ne la florojn sur rozarbo,
mi fumas, kiel la malseka karbo,
kaj por virina ĉarmo, am-intimo
ne estas flam' al mi en la animo.

Ĉu tio estas ŝajno do aŭ vero?
Nu, estas la ver' en la afero,
kaj ties kaŭzon tuj mi jene notas:
vi, karulino, troe min dorlotas.

Troductorita knabo vivas roze,
kondukas des pli spite kaj moroze.

Ne vidis mi okulojn, kiuj same
min alrigardus zorge, varme, ame,
kiuj rimarke kaptus tuj surprize
la mankon de butono surĉemize,
nek manojn tiel lertajn en komplikoj
de purigado aŭ kudrad' de flikoj.

Ho, viaj manoj! Vere, hom' ne kredas
kiel bongustajn kukojn ili knedas!
Kaj kiam vi preparas vespermanĝon,
vi povas fari la feinan ŝanĝon:
el mankoj fari lukson. Tiaj pladoj
ne estas ĉe regal' de diplomatoj.

Naskiĝis viaj brakoj por brakumo
kaj penas de mateno ĝis mallumo,
ke ĉio laŭ la ebloj bonkvalita
haviĝu al la edzo invalida.
Brakoj, kreitaj por brakumo! Vane!
La vir' ne ame febras, sed malsane.

Sur viaj vangoj freŝaj rozoj pompis;
la vivklopedoj ilin jam derompis.
Ne ĉesis milda ĉarm' de viaj trajtoj,
sed sur la frunto jam aperas faltoj.
Mi tamen kore gardas kun angoro
la iluzion de la rozkoloro.

La koro al vi estas trezor-gemo
plenplena de tenero kaj zorgemo.
Ho, kara koro, vaste varm-eligu,
am-radiana, glaci-degeliga!
Mi ne tre mirus, se de ĝia varmo
reflorus vintre la printempa ĉarmo.

Via animo havas la profundon
de l' maro. Ho, ekvidi ĝian fundon
mi deziregus, por sciiĝi, kio
vin helpas, kia forto aŭ magio,
ke la klopodojn vi elportas mute,
kaj — kial do vi amas min entute?

Rideto via estas tiel bona
kaj bela kiel freŝo rozburgŝona.
Vibron kurigas ĝi tra ĉiu membro,
kiel memor' de Majo en Novembro.
Ĉe l' vido de ĉi tiu rido flora
vin stultaj homoj kredas sendolora.

LIBERO

Ĉi vorton vi ne rajtas elparoli
simile al aliaj cent kaj cent,
dum la eldiro devas al vi boli
en la animo la plej sankta sent'.

Majeste sonu ĝi el via buŝo,
mistere kiel la revelaci',
aŭ korjuble kiel post akuŝo
la krio de patrina emoci'!

Ĝin ne diradu trive, ĝisagace:
en stalo ne konvenas diadem'.
Kaj se ĝin diras despotet' aŭdace,
la sankta vort' ŝanĝiĝos je blasfem'.

LAMPO KAJ STELOJ

Post estingiĝ' de l' lampobruloj
la tempo pasis jarpostjare,
ĝis, blindiĝinte, la okuloj
komencis ree vidi klare.

Post estingiĝ' de l' lampobruloj
l' okuloj ree vidas klare,
foriĝis la incensnebuloj,
la ruĝa stelo brilas kare.

La ruĝa stelo brilas kare,
kaj ni esperas, ke en helo
esperradia kun ĝi para
rebrilos nia verda stelo.

FEBRO

Neniam estis tia! Mi sinjoras!
Montaroj verdas tra l' fenestroj grandaj,
sunbrilo bene miajn tagojn oras,
nubetoj blankaj naĝas, rozorandaj;
feinoj varte super mi deĵoras,
regalas min per bonoj fajne frandaj;
min mole lulas lito kaj fotel',
jam ŝajnas, ke mi estas en fabel'.

La sola devo: kuŝi kaj ripozi,
kaj ĉio servas min, la kuracaton,
humoron mian oni volas rozi,
prizorgas saĝaj kapoj mian «staton».
Ne nur tablojdojn ili povas dozi,
sed ankaŭ ĉarmon, varmon, delikaton.
Servata tiel estis nur la princ'
havanta la servuton de provinc'.

Min lulas lito sur la blanka brilo
de la kusenoj, sed mi nun subite
min sentas ŝvebi, flugi kun facilo:
min kvazaŭ levas en zigzagoj, glite
la lantaj frapoj de hirundflugilo,
kaj dume mi rimarkas mirigite,
ke mi elkreskas je mirakla grand'.
Nun side haltas mi sur nuborand'.

Kaj vidas mi la tutan mondkonfuzon,
la kompatindajn homojn de l' planedo

la ekspluaton, la potenc-misuzon,
kredmankon plenan apud blinda kredo,
militperforton, pace trompan ruzon,
la egajn malegalojn de l' posedo,
kaj la promesojn brilajn pri l' futur',
kaj la minacojn de l' atom-terur'.

Sed mi, giganto, ne senfare sidas!
Mi eklaboras per kolosaj manoj:
subpremon kaj arbitron mi likvidas,
neniiĝante falas la tiranoj,
kaptitojn justajn al liber' mi gvidas,
forviŝas limojn antaŭ homaranoj.
«For ekspluato! — malpeziĝa ĝem'
anoncas — for sklaveco kaj sklavem'!».

«Huŝ!» De senlima lando de vizio
al mia lit' mi falas pezpalpebre:
mia potenc', ridinda iluzio,
fandiĝas en aeron nepalpeble.
Ĉu estis ĝi delir' aŭ fantazio?
Egale! Mi frostremas, kaj min febre
bruligas en statuo de Moloĥ'
bestetoj de la profesoro Koch.

RIKOLTO

Tro ardas jam la suna kiso,

formaturiĝis la ĉerizo,
la vaksmatura greno — ora gajn' —
la kapon klinas antaŭ la kombajn'.

En sakojn lirlas or' tritika,
jen la liriko plej lirika.
La komunumaj sakoj portas ĝin,
la kooperativ' rikoltas ĝin.

La tuto estas idilio
de l' tutvilaĝa familio,
solene granda festo de l' or-gren'!
Ĉu zumas la kombajno aŭ orgen'?

Jen kiel mi ĝin fantazias.
Ĉu tiel estas, mi ne scias.
Ho, se mi povus el ĉi bela kaĝ',
eskapi hejmen al la naskvilaĝ'!

IDOLFALO

Defalis la idolo kaj lia gloro mortas...
Statuojn liajn ĉie disbatas martelfrapoj.
Oni jam lian laŭdon ne kantas kaj ne vortas,
forstrekas lian nomon el libroj kaj el mapoj.

Laboris la popolo kaj kreis grandan, novan,
mirindan kaj heroan. Li brilis kaj sentencis,

kaj ludis ĉioscian kaj ludis ĉiopovan
kaj la Homaran Lingvon ekstermi li intencis.

Juĝisto mi ne estas, nur esperanta homo,
sed — Mene Tekel — legu flamskribe la misteron:
La famo estingiĝos kaj forgesiĝos nomo
al tiu, kiu volas estingi nian stelon!

GLACIROMPIĜO

La vivo vintris. Dikis neĝtapiŝoj.
La frosta ĉiopovo brove murdis,
plej sanktajn vortojn preĝmaŝine gurdis
adeptoj kaj gazetoj kaj afiŝoj.

Paroli oni rajtis nur en kliŝoj.
Jam ĉiu homo vostosvinge hundis,
la pensoj en rivero alprofundis
kaj fuĝis en la ventron de la fiŝoj.

Sed falis tiu ĉiopovo vintra,
riverglacio estas fendiĝinta,
kaj tra la glacibreĉoj en sunbrilo
aervezikoj en ŝaŭmanta denso
perladas sur la akvo: el ekzilo
revenas ĉiu rifuĝinta penso.

LA BONA OĈJO BION

Ni kantu jam pri Bion, oĉjo bona,
ĝoje, ke lia speco ne elmortas.
Li, libraĉeta kaj gazetabona,
eĉ versojn legas kaj la stelon portas.
Li estas dupieda propagando,
ĉiu evento verda — por li frando,
kiun li ĝuas elpuŝante krion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

La lingvo ne malsanas anemie:
Vortaro Plena, Plena Gramatiko
aspektas jam pli ol akademie
kun la timeble respektinda diko.
Kaj ATA-ITA-skriboj, Terminaroj!
Se oni pesus, estus du kvintaloj.
Ekkrias nia bona oĉjo Bion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

Dankeble al la dezirata lakto
la vangoj de l' Movado dike glatas:
grasiĝo de UEA estas fakto,
ankaŭ la digna SAT jam ne malsatas.
Ĉar estas multaj SAT-geedzigitoj,
grandnombre kreskas jam la satanidoj.
Ekkrias nia bona oĉjo Bion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

Ne nur la plenaĝuloj ĉiujare,
sed ankaŭ la infanoj kongresetas,

pri io-ujo-stato scias klare
kaj tukon, vazon Esperante petas,
eĉ, kiujn multaj trovas neallogaj,
plezuras pri la vortoj neologaj.
Ekkrias nia bona oĉjo Bion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

Sed pli ol tiu ĉi florad' kaj kresko
ja gravas en la Esperanta vivo
tiu decida venko en Unesko,
kiun elluktis nia brava Ivo.
Dum Blinkenberg sin kaŝis en la kelon,
eĉ Oriento streĉis la orelon.
Ekkriis nia bona oĉjo Bion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

Ne vane la kantistoj jam esperas,
ke l' Muza kis' ne restos nur sekreta:
Régulo Pérez plej regule peras
verslibrojn al popol' plej aĉetpreta.
Ho, eble post ioma paso tempa
eldonos li poemojn eĉ de Emba.
Ekkrios tiam bona oĉjo Bion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

Ni ne forgesu pri legaĵo spica,
kiun prezentas ĉiam ĉe l' apero
la Norda Prismo, Suda Stelo, Nica,
kaj eĉ se mankas al ni ekzemplero,
ni *scias* pri l' ekzisto de l' revuoj,
kaj jam eĉ tio banas nin en ĝuoj,

ke krias nia bona oĉjo Bion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

Kelklande iam estis granda fasto,
kaj pluraj, laŭ la modo oblikvante,
prenante Esperanton por balasto,
formanĝis siajn librojn tutakvante.
Jen manĝo fasta, ne tre bonkvalita,
eĉ se kun margarino surŝmirita.
Horore kriis bona oĉjo Bion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

Jen estis la epoko de malfondo:
la forvelkiĝ' de l' arbo asocia,
la morto de Literatura Mondo,
«ne taŭgas lingvo krom nacinacia».
Sed malgraŭ kvako de la veter-ranoj,
eltenis spite kelkaj veteranoj
kaj inter ili bona oĉjo Bion.
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

Ĉi-tempe eĉ Balkányi ne laboris,
la artikoloj restis en burĝono,
kaj Kalocsay triste nur langvoris,
eĉ Floroj estis al li de Malbono.
Feliĉe Waringhien ĉiulunde
mal-malojn al li sendis plu abunde.
Ne diris, tamen, bona oĉjo Bion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

Kaj fastis Baghy en la nesto doma,

sin kutimigis al ĉi striktaj limoj,
kaj, dum cerbumoj pri la Homo Homa
li ŝajnis esti unu el Viktimoj,
sed diris tamen: «Emba, hej, vi vidos,
Konsilantaron foje mi prezidos.
Mi sub Pomarbo antaŭsonĝis tion».
Ho, kion dirus nun la bona Bion!

Mi fastis kun Maria (en la Grupo)
eĉ ludis patron-panjon En Ekzilo,
kaj dum boladis nia fabo-supoj
ni revis jam pri nia nova filo.
Por doni al ni la necesan hardon,
Bartelmes sendis la Junecan Ardon.
Juneca ardo, ĉu ni havas tion
almenaŭ tiom, kiel oĉjo Bion?

La granda fasto pasis for postlonge
dank' al Unesko, Bokarev-klopodoj,
samideanoj ĉesis dormi ronke,
venis gazetoj, libroj (eĉ kun odoj).
Kaj are, kiel en rivero flosoj,
aperis ankaŭ ĉiam novaj glosoj.
Ekkriis nia bona oĉjo Bion:
«Ho, se mi povus lerni ĉion tion».

Li tamen lernas, pigre ne bradipas,
li estas ne maljuna, eĉ se olda,
instruas, organizas, varbas, skribas,
eterne esperporta, ĝojherolda,
en la farado sen memfanfarado,

model' de samidea kamarado.
Ni povas diri mem pri oĉjo Bion:
«Ho, se la kara Majstro vidus tion».

AL KAMARADO

Vi, kamarado, trovas turpa,
ke mi kun buŝ' acida, kurba
rigardas nian belan kreskon,
ĉiopromesan adoleskon
de la socialismo.

Mi, kamarado, entuziasmus,
se mia tus' ne tiel spasmus,
se ne sur rando de pereco
sed sane penus mi por kreo
de la socialismo.

Ho, kamarad', al alta alto
atingu per giganta salto!
Mi invalidas jam por lukto,
por mi jam ne maturas frukto
de la socialismo.

KIAL VI HALTIS?

— La celo fiksa vokas flagosvinge,
minutoj urĝas en freneza kuro,
progreso pretermuĝas fulmatinge
el ombro de jarmiloj al futuro.

Rigardu, frato, jen, la dia Homo
per tondraj spacraketoj jam veturas,
kial do haltis vi ĉe l' gardodomo,
kiun eksprese trajno preterkuras?

Paseon aĉan vi ja abomenas,
kial do gaje kaj kun freŝa forto
nun en la marŝ' la paŝon vi ne tenas?
— Rompita en mi estas la risorto.

SOMERA ARDO

Varmego en la sango — bolegas la aero.
Instinktoj tiras-puŝas por ĝuo kaj sufero.

Sopir' plezuravida — ho, ardo de la suno!
Rapidu en voluptoj, se gravas nur la nuno.

Sovaĝe brulaj kisoj — grenkampoj grajnfekundaj.
Hastigu la rikolton de ĝuoj kelksekundaj!

Flamantaj amantinoj — ja venos vintraj ventoj.
Kroĉiĝu al la tagoj kaj horoj kaj momentoj!

Brakum' ankoraŭ ardas — filandroj flosas naĝe.
La velko proksimiĝas, hej, spitu ĝin kuraĝe!

Somer', somer', virinoj: sukplenaĵoj!
La longo de la vivo apenaŭ kelkaj paŝoj.

Malnovaj saĝoj — ilin jam l' antikvuloj sentis,
Pli novan kaj pli saĝan ĝis nun ni ne inventis.

DRINKOKANTO

Amikoj, levu, levu glason,
la Tempo ne ĉesigas pason,
do drinku ĝis la fund',
ja post dimanĉo venas lund'!

En bona vino estas flamo,
arom' magia, sorĉbalzamo,
do drinku ĝis la fund',
la akvo restu por la hund'!

Ĉe suĉ' de suko eliksira
pli bone sonas voĉo vira,
do drinku ĝis la fund',
kant' flugu kiel la hirund'!

Se en la kap' laboras vino,
pli dolĉas ankaŭ la virino,

do drinku ĝis la fund',
vi naĝos en ĉiel-inund'!

Kaj se ŝi vin forlasis turpe,
do drinku, ĝis vi iros kurbe,
jes, drinku ĝis la fund'
por la kurac' de l' ama vund'!

Se oni diras: vivu saĝe,
ne klinu kapon malkuraĝe,
sed drinku ĝis la fund'!
La vivo estas nur sekund'.

Do gaju kise, gaju kante
kaj ne suferu soifante,
sed drinku ĝis la fund':
ne estos vin' en terprofund'!

VIRINOJ VARMSINAJ

Ripročas korvoj de sur arbobranĉoj
la homojn, kiujn kovras nebulfranĝoj.
Tremolfolio estas mia kor'.
Virinoj, min ne lasu for!

Kiel al grega korto lup' avida,
al floroj jam embuskas velk' rapida.
Mi timas, frostas kiel mola pup'.

Virinoj, kaŝu min per arda jup'!

Jen mi sterniĝis en la frid' vespera.
Varmsinulinoj kun la kor' tenera,
ho, flugu kun mi al ĉiel', se eble.
Sed, povas esti, mi deliras febre.

MEMORPANORAMO

De sur kusen' dormema de l' langvoroj
al vesperiĝ' de l' vivo mi rigardas,
kaj foraj bildoj, buntaj de koloroj,
en la subira suno al mi ardas.

El la paseo eĉ la grizajn tagojn
ia magie stela bril' nun vestas,
kaj ili pompas kiel fe-imagoj,
ridetas, dolĉas, ravas kaj majestas.

Sur flamrubandoj de la sun' subira
feinoj dancas en vualoj bluaj,
kaj flirtas pro l' petola tuŝ' zefira
iliaj oraj haroj ĝisgenuaj.

Sed se la sun' subiros en lontano,
paliĝos ĉio, kaj ĉe l' tagofino
demand' grimacos, strabe de profano:
Ĉu venos nova tag' kaj nova ino?

Ne, ne! Ankoraŭ daŭras dolĉa danco
de falsaj briloj sur vespera nubo,
ankoraŭ daŭras tromp', ke estas ŝanco,
kiel al iam febrosongâa bubo.

Ankoraŭ banu sunradioj flamaj
revive vibrajn plej trezorajn horojn,
kaj daŭru la mensogo, la iamajn
sopirojn transformanta en memorojn!

Ja post la sunsubiro forsvingiĝos
en la nenion ĉiu rev-anĝelo,
kaj la memoroj falsaj estingiĝos
kiel post lasta flagro la kandelo.

TESTAMENTO

Ekfebris pens': la tero tuta
pereos per atom-ekstermo!
En ĉi pereo absoluta
la mondo estos do kaputa
kune kun mi, la eta vermo.

Mondkataklismo min forviŝos,
ne aĉa krev' en orfa solo.
Ŝtiparo mia vere riĉos,
se la homaro kunbruliĝos.
Ĉu estas do pli da konsolo?

Konsolo? Ho ne! Fia vanto!
Skorio de anim' ribela!
Mi diru en ĉi tiu kanto,
eble la lasta, de mortanto,
ke l' vivo estas tamen bela!

Al *vi* mi diras, hom'! Ne lasu
perei la homvivon varman,
leviĝu, ĉiuj, kaj amasu,
kaj kriiu, hurlu kaj frakasu
la frenezumon atom-arman!

Tial la Hom' do iĝis granda,
kapabla eĉ por mondrenverso,
ke uze de ĉi pov' giganta
li mem elmortu, memmurdanta,
por mokrideg' de l' Universo?

Ne! Venku la pli homa homo!
En tiu sento orakola,
ke li sen funga mondfantomo,
sen mensa diseriĝ-simptomo
plezuros pri la viv-aromo,
mi feliĉege mortos sola.

POPOL' NI ESTAS...

Popol' ni estas, ne movado nura,

kaj nia land' la tuta tuta ter'.
Standardo nia, de sangverŝoj pura,
portas koloron verdan de l' esper'.

Kaj havas ni heroojn, eĉ martirojn
luktintajn kun malico kaj malkler'.
Poetoj propraj sonorigas lirojn
pri amo, paco, justo kaj liber'.

Ĉar kreis nin laŭ sia psika bildo
l' unua homarano, Zamenhof,
ni luktas plu kun senmakula ŝildo
por nova mondo kaj por bona nov'.

Popol' ni estas, ne movado nura.
La religio al ni la kompren'!
La lingvo kara, viva kaj matura
por ĉiuj sin proponas kiel ben'.

Popol' ni estas ĉie en popoloj,
kulturon propran portas per torĉflam'.
Kojniĝis ni en ĉiuj homtavoloj.
Aŭ — tiel estu, se ne estas jam!

VETERAN-ENTERIGO

Kiel la folioj velkaj
deŝirataj de la vento,

jen la postrestintoj kelkaj
de la veteran-taĉmento
falas unu post alia.
Venis vico via.

Ĉesis por vi ĉia lukto,
hasto, urĝo kaj nervozo
kaj klopodo kaj produkto,
nun jam venos la ripozo,
venos la ripozo vera
en trankvil' subtera.

Akompanas vin hodiaŭ
ni en trup' maldensiĝanta,
kaj mi scias, ke l' adiaŭ
de la hor' funebroka
baldaŭ laste min salutos.
Tombo glutos, glutos.

Sed se l' lasta veterano
sur la tombofundon venos,
ĉe l' funebra akompano
jam la verdan flagon tenos
juna trup' en mano ŝirma,
kaj kun paŝ' pli firma!

ŜIPO

Eknaĝi volas jam la ŝipo,
kiun mi konstruadis ŝvite.
Dum ĝi pretiĝis, mia ripo
multfoje kurbis penstreĉite.

Nun miaj jaroj estas en la
feraj' de l' holdo kaj ferdeko.
Portiĝos ĉiuj. Por mi jen la
horetoj lastaj sur la seko.

Kiam la ŝipo malaperos,
glatiĝos baldaŭ akvorondoj,
kaj morta muto rekonkeros
la lokon de l' kirlitaj ondoj.

SINOJ

Ĉu estas io sur la tero
pli dolĉa, ol la sin' patrina,
kien soifo je tenero
nin logas por luliĝ' intima?

Ĉu estas io sur la tero
pli dolĉa ol la sin' virina,
kien la alta ammistero
nin logas por plezur' fascina?

Ĉu estas io sur la tero

pli dolĉa ol la sino tera,
kien la fata Furiero
nin lokas por ripozo vera?

GLOSOJ

Klarigitaj estas ĉiuj vortoj ne troveblaj en la Plena Vortaro (3a eldono). Signo de fontlokoj: (b) = Boirac (1909); (gr) = Grabowski (1919); (gm) = Grosjean-Maupin (1910); (pg) = Parnasa Gvidlibro (1932); (pe) = Pechán (1961); (s) = Plena Vortaro, Suplemento; (v) = Vérax (1910); (wa) = Waringhien (1957); (wü) = Wüster (1923); (z) = Zamenhof.

- *adoleska* (pe, wa, wü): plenkreskiĝanta
- *bavi* (pg, pe): ŝaŭme salivi
- *bradipo* (s): trifingra mamulo vivanta pende sur branĉoj, simbolo de pigreco
- *bunta* (s): multkolora
- *ĉardo* (gm, pe): hungara kampara drinkejo
- *desaponti* (z): seniluziigi
- *devanci* (pe): preterantaŭiĝi (en konkuro)
- *dizelo* (s): speco de eksplodmotoro
- *dura* (s): malmola
- *ergastulo*: labordomo de antikvaj sklavo
- *fajna* (s): delikata
- *fascini* (s): sorĉkateni
- *filandroj* (pe, wa): blankaj fadenoj ŝvebantaj en aero malfrusomere
- *fola* (pe): frenezeta

- *frida* (s): malvarma
- *gvati* (s): kaŝobservi
- *hasti* (s): urĝiĝe rapidi
- *hororo* (s): teruriĝo
- *kaputa* (pe, wa): mortinta, ruiniĝinta (familiare)
- *kombajno* (pe, wa): kombinita rikolt- kaj draŝmaŝino
- *kiĉo* (pe): artobjekto senarta, plaĉa nur al malbona gusto
- *langvora* (gm, pe, wa): malstreĉiĝinta korpe-anime
- *lanta* (s): malrapida
- *lasciva* (pe, wa): malĉastema
- *lirli* (pe, wa): agrable plaŭdeti
- *lontana* (pe, wa): malproksima
- *magra* (s): malgrasa
- *makjavelo*: politika senmoralulo
- *moloĥo*: kanaanida idolo, al kiu oni faris hom-oferojn, bruligante la viktimojn en la interne kava ferstatuo de la dio
- *morna* (s): preme malhela
- *moroza* (s): malbonhumorema
- *obskura* (s): malluma
- *olda* (s): maljuna
- *orgojlo* (s): malhumila fierego
- *palestro*: antikva luktejo, korpekzercejo
- *paseo* (s): pasinta tempo
- *pigra* (s): maldiligenta
- *povra* (s): malriĉa, kompatinda
- *predo* (s): milit- aŭ rab-akiraĵo; predi: akire milite aŭ rabe
- *primavero* (pe): printempo
- *pugo* (s): postaĵo homa
- *rastro* (pe): fosilo kun triangula ferplato akutangula al la fosilo

- *ronĝi* (pe, wa): mordeti
- *spuro* (s): postsigno
- *suspiri* (s): ĝemspiri
- *sterila* (s): 1. senfrukta, produkti nekapabla; 2. senmikroba
- *ŝutro* (s): fenestrokovrilo
- *tablojdo* (s): plata medikamentpastelo
- *tarda* (s): malfrua
- *temerara* (pe, wa): ĉioriske sentima
- *tenera* (s): dolĉe kaj varme amkondata
- *torpori* (pe, wa): pli-malpli perdi la sentkapablon, obtuze senti
- *trista* (s): malgaja
- *trivi* (s): uzkonsumi
- *turpa* (s): malbela

ENHAVO

- *Prologe de NORBERTO BARTELMES*
- *Mi vivis longe en ekzilo*

I. EKZILO

- *Mi marŝas al la malproksimoj*
- *Tragedieto*
- *Tiam*
- *Martelkanto*
- *La ĝardeno de l' patrino*
- *Katerina*
- *Feliĉo*

- Matena freŝo
- Someraj voĉoj
- Vi
- La lasta vespero
- Tago el mia vivo
- Aŭtuna suspiro
- Vespersilento
- Nur unufoje
- Sub la selo
- La amatoj de la stelo
- Krizo
- En nokta horo
- Ĝis la venk'
- Al hirundo
- La kanto de la violo
- Mi amas la vilaĝon
- Sur la granda paŝtejo
- La kanto de pluganto
- Somera seko
- La kruela somero
- La koĉero
- Peza ripozo
- Tombo
- Demando
- Antaŭ la spegulo
- Knabeto mortis
- Eterna lulkanto
- Al forironto
- Printempa velko
- Renkontiĝo
- Mia patrino
- Al knabino palvizaĝa

- Nigra majo
- Al pluvego
- Rifuĝo
- Letero al N. Bartelmes
- Faladas neĝo...
- Rebrilos la stelo

II. AZILO

- *Printempe kaj aŭtune*
- 1945
- Printempiĝo
- Demokratio vivu!
- En songo
- Kaj flugu la animo...
- Majkanto
- Sur larĝaj kampoj...
- Fabela poplo
- Margareta
- Dimanĉa mateno
- Vivsonoro
- Konsiloj
- Mia filineto
- En mia naskvilaĝo
- Vana, vana
- Al la memoro
- En soleca horo
- Mi
- La penso
- Allogiĝo
- Frostfloro
- Mi vin deziras...
- Koni vin...

- Palinodio
- Turdo
- Primavera
- Akvinkum
- Falo
- Enigmo
- Lasu...
- La neakireblaĵo
- Vesperaj papilioj
- Hirundo mortpafita
- Splitoj
- La arbo de juneco
- Roz' aŭtuna
- La strato
- Novjara penso
- Vinon
- Stulto
- Ama poemo
- Libero
- Lampo kaj steloj
- Febro
- Rikolto
- Idolfalo
- Glacirompiĝo
- La bona oĉjo Bion
- Al kamarado
- Kial vi haltis?
- Somera ardo
- Drinkokanto
- Virinoj varmsinaj
- Memorpanoramo
- Testamento

- Popol' ni estas...
- Veteran-enterigo
- Ŝipo
- Sinoj

- Glosoj
- Enhavo

Noto de transskribinto:

En la originala libro aperis «Postkorekto», kun mallonga listo de preseraroj. Mi registris ilin, kaj kelkajn aliajn ŝanĝetojn kontraŭ la originalo per html-aj komentoj.

[The end of *Ekzilo kaj azilo* by Imre Baranyai (as Emba)]